Nr. 3

Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 **Trimonata** **jul.-sept. 1988**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Redaktisto: István Ertl, Universitato ELTE, Budapest
Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Balogh V. – *Rilato inter la matematika pensmaniero kaj Esperanto-instruado (dua parto)* 1

Fiedler, S. – *Pri karakterizaĵoj de pedagogiaj fakvortoj en Esperanto* 3

MacGill, S. – *Celolingvaj ekzercotipoj* 9

RECENZOJ 17

RAPORTOJ

Barcsay, Z. – *Tradiciaj kaj modernaj instrumetodoj de la Esperanto-instruado* . . 20

Pitt, A. – *Kial motivado?* 22

AKTUALAĴOJ

ILEI tutmonde 26

LETERKESTO 31

ANONCOJ 32

REPREZENTANTOJ

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Nigerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

Jarkolekto 18 **jul.-sept. 1988** **N-ro 3, 1988**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

Didaktiko

VIKTÓRIA BALOGH

RILATO INTER LA MATEMATIKA PENSMANIERO KAJ ESPERANTO-INSTRUADO (dua parto)

Prepari la parolkapablon dum lingvoinstruado estas malfacila tasko, kiu havas kelkajn gradojn. La *unua* grado en parolado estas la demanda-responda formo. La geknaboj respondas per frazmodeloj la demandojn starigitajn. La *dua* grado jam supozas memstarecon, ĉar ni dezirus, ke ili parolu iom daŭre pri iu temo. Pro tio ni paroligas ilin pri bildoj sen demandoj aŭ lernigas al ili ŝercojn kaj rakontojn parkere. La malavantaĝo de la dua maniero estas, ke ili kutime ne povas apliki la ellernitajn frazojn en siaj liberaj direndaĵoj; de la dua, ke eĉ en la gepatra lingvo ne venus al ili frazoj pri la bildoj en la kapon.

La matematika pensmaniero povas helpi je tio: agadseriojn matematikistoj reprezentas per procez-figuroj. La plej simpla el tiuj estas la *lineara algoritmo*, en kiu la agadoj senpere kaj sen retrokuploj sekvas unu la alian. Ekzemple en respondo al la demando "Kiel vi preparas vin matene?" la agoj:

MI VEKIĜAS JE LA SEPA
MI ELLITIĜAS
MI LAVAS MIN
MI KOMBAS MIN
MI VESTAS MIN
MI MATENMANĜAS
MI PURIGAS LA DENTOJN
MI KONTROLAS MIAN TEKON
MI ADIAŬAS KAJ IRAS EN LA LERNEJON

estas formuleblaj tiamaniere, se la unuopajn agojn kiel "instrukciojn" oni enskribas en paralelogramojn, en "blokojn" kaj kunligas ilin per sagoj. La algo-

ritmon komencas, resp. finas la instrukcioj START (EKO) kaj STOP (FINO), skribitaj en cirklon. La lernantoj simile povas koncepti por si ekz. la agadseriojn, kiuj respondas al al demandoj:

Kiel vi aĉetas en memserva vendejo?
Kiel vi kuiras ovaĵon?
Kiel eblas telefoni?
Kiel vi tagmanĝas?
Kiel oni lernas posttagmeze?
Kiel oni aĉetas bileton por vojaĝo? ktp.

Dum la lernantoj preparas la procezfiguron, ili solvas la taskojn kolekti elementajn paŝojn de iu ago, esprimitajn per simpla frazo; ordigi tiujn paŝojn en logikan ordon; elekti la gravajn paŝojn kaj forlasi la malgravajn. Kiam ili rerakontos la agadserion, ili pensos ne pri unuopaj ellernitaj frazoj, sed pri unuopaj agoj jam originale esprimitaj en Esperanto.

Niaj agadoj ne ĉiam estas linearaj. Ĉe la paŝoj de la algoritmoj povas okazi problemoj, demandoj, kiuj modifas la vojon de la agado. Ekz. en la algoritmo por "Julia skribas leteron" jam inter la unua kaj dua paŝoj:

1. Julia prenas leterpaperon kaj globkrajonon.
2. Ŝi ekskribas la leteron;

povas aperi la demando:

Ĉu ŝia globkrajono havas bonan enmetaĵon?

Ĉe la respondo, jesa aŭ nea, okazas disbranĉiĝo: kaze de neo ni devas enkonduki plusan agon:

Ŝi devas ŝanĝi la enmetaĵon de la globkrajono.

Tiajn disbranĉiĝajn punktojn oni signas per demando skribita en rombo, el kiu sagoj montras en du direktojn; tamen la eventuala plusa ago retrokupliĝas per sago al la lineara parto de la procezfiguro.

Tiaj disbranĉiĝoj kompreneble eblas je ĉiu paŝo. Dum la konversacio pri la algoritmigita temo unu persono rakontas kaj devas respondi al la intermetitaj demandoj ("disbranĉiĝaj punktoj") kaj nur tiam li povas daŭrigi. Tiajn konversaciojn eblas direkti tiel, ke ili koncentriĝu pri praktikado de iuj gramatikaĵoj: diversaj verboformoj, -tempoj, refleksivaj verboj, ktp.

Fine, en la procezfiguroj povas aperi ankaŭ cirkloj, se la plenumo de iu agado bezonas plurajn, sed samajn paŝojn. (Ekz.: Akvumu 12 florojn!) Tiam enkondukiĝas ĉe la disbranĉiĝaj punktoj demandoj de la tipo "Ĉu vi jam akvumis ĉiujn florojn?" Temoj kun tiaj cirkloj povas esti: fruktokolektado, ŝuaĉeto, ktp. Laŭ la lineara algoritmo formiĝas la *rakonta kapablo* de la lernantoj. Laŭ la disbranĉaj algoritmoj ni ekzercas *konversaciadon* inter ili.

SABINE FIEDLER

PRI KARAKTERIZAĴOJ DE PEDAGOGIAJ FAKVORTOJ EN ESPERANTO

Tiu ĉi artikolo intencas prezenti rezultojn de empiria analizo pri fakvortoj ofte troveblaj en pedagogiaj faktekstoj. La celo estas konatiĝi kun la fakta evolustato de la fakvortaro en pedagogio por tiri sur tiu bazo konkludojn por la estonta terminologia laboro en tiu sfero.

1. Materialbazo

Pedagogio, t.e. la scienco pri edukado, kiu esploras la leĝojn de la eduka proceso kaj ellaboras la teorion de ĝia gvidado kaj evoluado, disolviĝis el relative unueca kaj unuopa scienco al sciencokampo ĉiam pli kaj pli disbranĉiĝinta. Al tiu sciencokampo hodiaŭ apartenas sciencobranĉoj, kiuj esploras la edukan proceson en la socio kiel kompleksan objekton (ekz. la ĝenerala pedagogio, pedagogia historiografio, prieksterlanda pedagogio).

Ni krome subdividas la pedagogion al t. n. sferaj sciencobranĉoj, kiuj studas edukadon en la diversaj evolustatoj de la edukatoj aŭ en la diversaj organizaj formoj (ekz. la lerneja pedagogio, profesia pedagogio) kaj ankaŭ al specialaj pedagogiaj sciencobranĉoj distingataj laŭ socie gravaj aferoj ekster la eduka sistemo (ekz. la pedagogia psikologio, pedagogia ekonomio, pedagogia sociologio).

Tia evoluo de la pedagogio estas esprimo de la procezoj de diferenciĝo kaj unueciĝo, kiuj estas karakterizaj por la moderna scienca evoluo ĝenerale. Por nia analizo, tamen, tiu situacio signifas, ke necesas limigi la analizkampon por havi homogenan materialbazon. Ŝajnas sub tiuj kondiĉoj konvena koncentriĝi pri tiu speciala pedagogia sciencobranĉo, kiu plej multe gravas por nia laboro kaj en kiun ni sekve ankaŭ devas enordigi la plejmulton de la tekstoj troveblaj en la esperantlingvaj pedagogiaj revuoj, libroj ktp., nome pri la sfero de *metodiko de fremdlingvo- (antaŭ ĉio Esperanto-) instruado*. Temas do pri parta branĉo de la pedagogiaj sciencoj kun interscienca karaktero, kiu havas rilatojn antaŭ ĉio al pedagogio, lingvistiko kaj psikologio. Sekve oni povas supozi, ke ankaŭ ĝia terminaro estas relative heterogena.

Bazo de la analizo estas sciencaj artikoloj kaj fakprelegoj pri la instruado de fremdaj lingvoj (antaŭ ĉio de Esperanto) en revuoj, monografioj kaj kolektaĵoj — entute ĉ. 500-paĝa tekstmaterialo.

2. Karakterizaĵoj de la fakvortoj

El la fakvortoj troveblaj en la supremenciita materialo estis elektitaj tiuj, kiuj aperas minimume 10-foje kaj en almenaŭ du diversaj tekstoj por trovi la plej gravajn terminojn. Tio estas entute 165 fakvortoj, al kiuj rilatas la sekva karakterizado laŭ la kriterioj: vortospeco, strukturo, sinonimio kaj polisemio.

2.1 Vortospeco

Inter la kolektitaj fakvortoj 136 estas substantivoj, 20 estas verboj kaj 9 estas adjektivoj. Do, la substantivo dominas kun 82.4 %, kio verŝajne estas rezulto de strebado al lingva ekonomio kaj precizeco, kio esprimiĝas per la substantivigado de verboj antaŭ ĉio helpe de la sufikso *-ad* por nomi pedagogiajn procezojn aŭ agojn (ekz.: *korektado, prezentado, aplikado, edukado, ekzercado, lernado, instruado, legado, tradukado, ripetado*).

Precipe inter la substantivoj montriĝas la jam priskribita interscienceco de la elektita sfero. Krom pedagogiaj ni trovas multajn terminojn el aliaj sciencoj, antaŭ ĉio el la psikologio kaj lingvistiko (ekz. *senkondiĉa reflekso, behaviorisma psikologio; gramatika genro, transitiveco de verbo*).

Jen la plej oftaj fakvortoj (kun nombro de ekzemploj):

lernanto (130)	kurso (70)
instruisto (118)	leciono (64)
ekzameno (80)	lingvo (54)
instruado (76)	lernado (34)
metodo (72)	scio (30)

La tabelo unue konfirmas, ke la elektita sciencobranĉo (metodiko de instruado de fremdlingvo) fakte estas parta branĉo de pedagogio, ĉar ĝi laboras per ĉefe ĝeneralpedagogiaj terminoj. Sekve la karakterizaĵoj de fakvortoj montrotaj en tiu kontribuo verŝajne ĝustas por pedagogiaj fakvortoj ĝenerale. Due, la tabelo montras, ke ankaŭ la nefakulo komprenas la plejmulton el ili, do, montriĝas la proksimeco de la pedagogia faklingvo al la ĝenerala lingvouzo.

2.2 Strukturo

Inter la ekzamenitaj fakvortoj 43 (26.1 %) havas plurelementan strukturon. La plej produktivaj strukturtipoj estas: substantivo + substantivo, adjektivo + substantivo, substantivo + substantivo kun prepozicio, participo + susbstantivo:

S + S (29): legokapablo, lernolibro, lingvoinstruado
A + S (20): rekta metodo, daŭriga kurso, gepatra lingvo
S + Sp (10): uzo de la lingvo, nombro de lernantoj, teorio de instruado
Part. + S (9): programita kurso, elektita studobjekto, rekonita lektoro.

La plej longaj fakvortoj konsistas el kvar aŭ kvin elementoj, ekz.: *unulingva universitata finekzameno, komencgrada fremdlingva kurso, antaŭprogramita ekzercformo, rektmetoda Esperanto-kurso*.

En la tekstoj tiuj plurelementaj fakvortoj ofte estas mallongigataj:

"La naciaj Esperanto-Institutoj kutime havas tutŝtatan gvidantaron kaj plurajn *lokajn ekzamenajn komisionojn*. La ĉefinstanco zorgas pri la ekzamenaj regularoj kaj pri samnivelaj konkretaj taskoj en la unuopaj *lokaj komisionoj*, kies membrojn ĝi rajtigas ekzameni." (METODIKO en la PRAKTIKO, Paderborn 1982, p. 17.)

La plej frapa karakterizaĵo de la fakvortoj rilate al ilia strukturo estas la apero de strukturaj variantoj. Konkuras antaŭ ĉio la formoj S + S kun A + S, S + S kun S + Sp kaj A + S kun S + Sp:

lingvolernado — lingva lernado
vesperlernejo — vespera lernejo
fremdlingvoinstruado — fremdlingva instruado
instrucelo — celo de la instruado
lingvo uzo — uzo de la lingvo
eduka celo — celo de edukado
ekzamena tipo — tipo de ekzameno

Ĉar la aŭtoroj krome sendiference substantivigas verbojn kaj senpere kaj helpe de sufiksoj, oni en kelkaj kazoj trovas eĉ kvar aŭ kvin strukturajn variantojn por la sama aĵo:

uzado de la lingvo — uzo de la lingvo — lingvouzo — lingvouzado;
ekzercadformo — ekzercformo — formo de ekzerco — formo de ekzercado — ekzerca formo;
kontrollaboraĵo — kontrollaboro — kontrola laboro.

Tiu varieco de formoj malfaciligas la komprenon de la tekstoj, precipe por la nefakulo, kiu ofte ne scias, ĉu temas pri la sama aĵo aŭ ne. Strukturajn variantojn oni devas rigardi kiel formon de sinonimoj, kiuj por ĉiu terminaro estas malavantaĝo kaj kiuj nun staru en la centro.

2.3 Sinonimio

Sinonimio okazas tre ofte en la ekzamenitaj tekstoj. Entute 89 el la 165 fakvortoj (53.9%) estas sinonime uzataj, se la kriterio estas interŝanĝebleco en almenaŭ unu kunteksto. Inter la sinonimoj estas ankaŭ multaj el la sub 2.1 nomitaj plej oftaj fakvortoj. Jen kelkaj ekzemploj:

La persono gvidanta la instruadon estas nomata krom *instruisto: instruanto, edukisto, docento, kursestro, kursgvidanto, profesoro, pedagogo*.

Anstataŭ *lernanto* troveblas: *studanto, kursano, partoprenanto, infano, edukato, studento.*

Ofte la aŭtoroj eĉ dum unu teksto variigas la nomojn, verŝajne por eviti vortripetojn, sed sen konsideri verajn diferencojn, kiuj ekzistas ekzemple inter *instruisto* kaj *instruanto* rilate la profesiecon. Similajn sinonimajn vicojn oni povus starigi por nomi aliajn pedagogiajn estaĵojn kaj agojn (ekz. *eduki – instrui – trejni – lernigi – klerigi*).

Konfuzo regas precipe ĉe la uzado de vortoj *proceso/procezo*. Do, ni trovas kaj *instruproceso/instruprocezo* kaj *lernproceso/lernprocezo*. Jen pliaj ekzemploj de sinonimoj:

hejma lingvo – propra lingvo – gepatra lingvo
encerbigo – enkapigo
poento – noto
atesto – atestilo – diplomo
teknika helpilo – teĥnika helpilo – teknika rimedo – teknologia rimedo
ekzercado – trejnado
ekzameni – testi
elementa kurso – komencgrada kurso – baza kurso
eksterklasa aktiveco – krominstrua okupiĝo

La necerteco de la aŭtoroj mem pri la korekta uzado de pedagogiaj fakvortoj montriĝas i.a. per variantoj, kiujn ili aldonas en parentezoj:

"La ekzamenoj estas necesaj kiam Esperanto estas *nedevige aŭ fakultative* instruata en..." (INFORMILO pri la instrua laboro. Majo 1987, p. 12)

"La bazprincipoj de la *rekta (senpera)* metodo estas..." (GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO, p. 287)

"La *natura (rekta)* kaj literatura metodoj laŭ sia esenco estas..." (INFORMILO pri la instrua laboro. Majo 1987, p. 9)

2.4 Polisemio

Pli malofte okazas polisemio, t.e. la apero de la sama vorto por diversaj aĵoj. Ekz.:

leciono: (1) parto de fremdlingva lernolibro: "Ekzemple en hungaraj lernejoj oni instruas Esperanton kiel fakultativan objekton dum du horoj semajne, dum unu jaro dek-du *lecionojn* el la lernolibro de Szerdahelyi." (METODIKO en la PRAKTIKO, Paderborn 1982, p. 21)

(2) organiza formo de lernado gvidata de instruisto: "Same la instruisto, transirante la sojlon de la klasĉambro, devas lasi for ĉiujn siajn zorgojn; dum la *leciono* li devas sin regi prefekte, esti bonhumora, sagaca kaj ĝentila". (INFORMILO pri la instrua laboro. Majo 1987, p. 11)

Ofte ĉi tie nur la kunteksto kaj la vivsperto de la leganto povas klarigi, pri kio temas. (Komp. la frazon: *La enkonduka leciono estas la ĉefa en ĉiu instruado.*) Sinonimio kaj polisemio ankaŭ kune okazas. Ekzemple al *leciono* en la signifo (2) estas substituebla: *instruado, instru-unuo, (instru)horo, -periodo.*

Kiel formo de polisemio estu rigardata ĉi tie ankaŭ la uzo de la sama vorto kaj en faklingva kaj en ĝenerallingva signifoj:

"...kaj post ĉiu instruhoro ĉiu lernanto estu pli riĉa je *konoj* kaj kapabloj..." (METODIKO en la PRAKTIKO, Paderborn 1982, p. 23) (faklingva uzo)

"...ĉar laŭ mia *kono* neniam aperis ebleco eksperimenti tiurilate." (FOKUSO 87/3, P. 9) (ĝenerallingva uzo)

"Tial dum la nedeviga instruado diversaj kontroloj povas esti nur libervolaj, se lernanto mem deziras kontroli siajn sciojn kaj petas lin *ekzameni*." (INFORMILO pri la instrua laboro. Majo 1987, p. 11-12.) (faklingva uzo)

"En tiu ĉi artikolo ni volas *ekzameni* la influon de la medio al la instruproceso." (ĝenerallingva uzo)

3. Konkludoj

Resume oni povas tiri la sekvajn konkludojn:

1. La montritaj karakterizaĵoj de la pedagogiaj fakvortoj (la proksimeco al la ĝenerala lingvouzo; struktura diverseco; multnombra sinonimio) estas ecoj, kiuj ĝustas por ĉiuj sociaj sciencoj. Ili estas la kaŭzo, kial terminologia laboro estas pli komplika kaj verŝajne pro tio malpli evoluinta en la sfero de sociscioncoj ol en natursciencaj kaj teknikaj branĉoj. (Alia ĉefa eco de terminoj el sociscienco – kiu en tiu ĉi artikolo ne estis menciita kaj indas apartan analizon – estas ideologiaj diferencoj.)


2. La karakterizaĵoj estas aliflanke tipaj por pedagogiaj fakvortoj ankaŭ en la etnaj lingvoj. Ili malfaciligas la komunikadon inter fakuloj (pedagogoj), kio kaŭzis rilate la etnajn lingvojn pritaksojn kiel ekzemple "dorna arbustaĵo de *perturbatio terminorum paedagogorum*" aŭ "La pedagogio estas pli folkloro ol scienco". Sed ĉar la faklingva situacio povas retroefiki sur la sciencon mem, unuecigo/normigo estas necesa kaj en la etnaj lingvoj kaj en Esperanto. Sekve la ĉefa konkludo de tiu ĉi analizo devas esti, ke terminologia laboro en la sfero de pedagogio en Esperanto ege necesas.

Notoj

1. Pri la diversaj branĉoj de la pedagogiaj sciencoj komparu: Paedagogisches Wörterbuch (Pedagogia Vortaro). Berlin 1987, p. 274-276.
2. Pli detalaj analizoj pri tiaj sinonimaj vicoj (aŭ vortkampoj) laŭ la opinio de la aŭtorino povas helpi determini kaj diferencigi fakvortojn, kiuj en fakvortaroj estas difinitaj parte nesufiĉe aŭ malmulte konforme.
3. Komp.: Fiedler, S.: Fachtextlinguistische Untersuchungen zum Kommunikationsbereich der Paedagogik – dargestellt an relevanten Fachtextsorten des Englischen (Diss.) (Faktekst-lingvistikaj studoj pri la komunikadsfero de pedagogio – prezentitaj je ĉefaj tekstotipoj en la angla lingvo – disertacio). Leipzig 1986
4. Vidu noton 3, precipe p. 61.

La aŭtorino komprenas sian kontribuon kiel elirpunkton por efektivigi internaciajn kontaktojn al terminologie interesitaj personoj en nia fako.

Dr. Sabine Fiedler, Riesaer Str. 5b
DDR-7050 Leipzig, Germana DR



CELOLINGVAJ EKZERCOTIPOJ

Stefan MacGill

Ĉi tiu artikolo prezentas diversajn ekzerco-tipojn uzitajn en la verkoj de la aŭtoro de la jena artikolo. Ili estas prezentitaj laŭ la grado de strukturiteco, kun la plej aŭtomataj unuaj kaj la plej malfermaj laste. Ĝenerale, sed ne ĉiam, ju pli aŭtomataj estas la ekzerco-formoj, des malpli ili postulas lingve produktivan plenumon.

A: Aŭtomataj ekzercoj:

Aŭtomataj ekzercoj estas tiuj, kies respondoj estas evidente pravaj aŭ malpravaj kaj kiuj estas esprimeblaj koncize, se ne per unu litero aŭ cifero, per maksimume unu vorto. Sekve, la korektado estas rapida kaj senduba. Ĉi tiu ekzerco-tipo havas krome la avantaĝon, ke ĝi estas facile enkomputiligebla kaj aŭtomate kontrolebla. Plia avantaĝo estas la eblo konstrui la respondojn por liveri kaŝ-frazon, kio donas (almenaŭ al pli junaj lernantoj) plian motivigon kaj ankaŭ ioman eblecon certiĝi, ke oni bone respondis. La ĉefa malavantaĝo aŭ pli ĝuste limigo de ĉi tiu ekzerco-tiparo estas la surfaceco de la pridemandeblaj nocioj. Ĝi plej taŭgas testi la scion de klaraj faktoj kaj malpli por testi nuancojn de kompreno, de konkludado aŭ deduktado. Ĝi bone taŭgas por testi konon de gramatikaĵoj, por rapide kontroleblaj hejm-taskoj, revizio ks. Ja eblas uzi kelkajn el la teknikoj por testi pli kompleksajn komprenojn (ekzemple de motivoj, kialoj, manieroj, sekvoj k.s.), sed tio postulas lertan antaŭ-preparadon de la demandoj, por ke ili konformu al la limigoj de la ekzerco-formoj. Aŭtomataj demando-formoj rapidigas la ekzercadon, permesas rapidan testadon de granda kvanto de sciendaĵoj, kaj donas rimedon okupi grupojn per silenta laboro, per tio liberiganta la instruiston verŝi sian atenton sur difinitan grupon en la klaso. Tamen, necesas limigi ilian uzadon kaj konservi ne-aŭtomatajn ekzerco-tipojn, kiuj postulas plene produktivajn kapablojn kaj kompleksan pensadon.

1. Vera-malvera: Jen la plej baza ekzerco-tipo, kun nur du eblecoj, markeblaj per "V" kaj "M", aŭ "A" kaj "B". Ĉi tio povas testi konon de universale konataj faktoj, ekz: "La ĉefurbo de Britio estas Glasgovo", aŭ komprenon de teksto donita, ĉu simpla (ekz: Johano aĉetis kvin pomojn), ĉu pli subtila (Li acêtis la pomojn ĉar li malsatis), en kiu kazo la kialo ne nepre estis eksplicite donita en la teksto, sed devas esti dedukte decidita.

2. Korekta-malkorekta: Ĉi tio testas gramatikan konon, kaj taŭgas por kazoj kun nur du eblecoj, ekz. akuzativo/nominativo, pluralo/singularo, -iĝi/-i, -igi/-i aŭ -iĝi/igi, konstrasto inter leksike konfuzeblaj vort-paroj ktp. Eblas uzi la teknikon por testi kapablon je unu el tiuj punktoj, aŭ pluraj samtempe (ekzemple La laŭta vekhorloĝo, p. 44, kiu havas la formon de kontinua teksto kun du variaĵoj ene, sed esence estas samspeca kiel la pli lista formo.)

3. Parigado: Necesas parigi elementojn el du kolumnoj; kutime tiuj en unu kolumno estas indikitaj per ciferoj kaj en la alia per literoj. Ĉi tio bone taŭgas por testi leksikon, kun unuflanke la vortoj kaj aliflanke sed en miksita ordo la difinoj, (ekz. Juna amiko §§/1. p. 10 pri familiaj rilatoj), gramatikon (ekz. Tridek roluloj. p. 38 pri revizio de la demandaj korelativoj), vorto-spec-rekonon (ekz. Laŭta vekhorloĝo, p. 37), aŭ komprenon per fraz-duonoj el aŭ pri teksto, kiujn oni devas ĝuste religi (ekz. LLV, p. 29).
Ĉi tiu ekzerco-speco estas iom pli postula por la plenumanto, ĉar tiu devas serĉi la ĝustan respondon inter deko da aliaj, kaj zorgi ne uzi respondon dufoje. Ĝi postulas apartan zorgon ankaŭ flanke de la kompilanto, ĉar neniu maldekstraĵo rajtas formi akcepteblan respondon kun pli ol unu dekstraĵo. Precipe en testado de kompreno de teksto, por kiu ĉi tiu ekzerco-formo ankaŭ taŭgas, estas tre malfacile konservi la unikecon de la ĝustaj respondoj: en dek-para ekzerco rajtas ekzisti nur dek akcepteblaj parigoj el la cent teoriaj ebloj, do la kompilanto devas provi ĉiujn el tiuj cent kombinoj kaj konvinkiĝi, ke naŭdek el ili estas neeblaj. Se unu el ili montriĝas eĉ iom ebla, necesas reformuli unu el la elementoj, sed ĉiu modifo malfermas la riskon de reakceptebligo de naŭ el la malpermeseblaj kombinoj. Aldono de kaŝ-frazo helpas la lernanton solvi la taskon kaj esti pli certa pri la rezulto, kio povas gravi en kazo, kiam instruista kontrolado ne estas tuj farebla.

4. Multobla elekto (komenca menuo): Ĉi tiu formo permesas elekton de tri ĝis kutime kvin, sed foje ĝis ok respondoj al ĉiuj demandoj, sed tiuj elekteblaj respondoj restas konstantaj por la tuta ekzerco. Tio taŭgas por testado de gramatiko, kie la nombro de eblaj finaĵoj estas limigita, ekz. verbo-tempoj: -as, -is, -os, -us, -u, -i (do nepre por reviziado, longe post la enkonduko de ĉiuj el ĉi tiuj finaĵoj), de la participoj: -anta, -onta, -inta, -ita, -ata, -ota, de -i, -iĝi, -igi, de -o, -a, -aj, -oj, -ajn, -ojn. Oni povas aldoni kaŝfrazon, se oni povas verki frazon en Esperanto per najbaraj literoj. (ekz. La unua vekhorloĝo, p. 97 en LLV).

5. Multobla elekto (varia menuo): Ĉi tio estas pli fleksebla variaĵo de la supra ekzerco-tipo, en kiu la nombro de eblaj respondoj estas

Ekzerco de la pariga tipo el la aperonta/anta libro *La laŭta vekhorloĝo ... kaj aliaj atentokaptiloj*, p. 176. Ĝi samtempe prezentas kaj testas la malfacilan leksikon el la lasta rakonto "La heroo". Ĝi evitas la problemon, ke unu numeritaĵo povas ligiĝi al pli ol unu literitaĵo.

Pli da vort-difinoj:

Jen dua listo de malpli facilaj vortoj el la teksto. Ili estas ĉiuj ne-substantivoj! Parigu ilin kun la ĝustaj difinoj en la dekstra listo:

1.	abrupte	A:	publike deklari.
2.	atenci	B:	timiga.
3.	averti	C:	malfacile.
4.	daŭre	Ĉ:	pensi longe kaj profunde.
5.	defii	D:	malkonsenti, malakcepti.
6.	elĉerpiĝi	E:	forte mallaŭdi.
7.	entuziasme	F:	subite.
8.	fandi	G:	ĉefe.
9.	flosi	Ĝ:	fiksi du pecojn de ŝnuro.
10.	hasta	H:	laŭ regulaj tempo-intervaloj.
11.	imuna	Ĥ:	kontinue.
12.	inspiri	I:	ne memori, ne zorgi.
13.	insulti	J:	finiĝi, ne plu resti.
14.	kolizii	Ĵ:	igi metalon likva per varmigo.
15.	kremacii	K:	malblovi.
16.	mediti	L:	maltimi, superi, kontraŭ-agi, spiti.
17.	minaca	M:	malhelpa, rezista.
18.	neglekti	N:	rapida, urĝa.
19.	nodi	O:	doni informon pri baldaŭa danĝero.
20.	obstina	P:	nedifektebla, neinfektebla, neatakebla.
21.	pene	R:	plenigi iun per entuziasmo kaj optimismo.
22.	potenca	S:	iri sen propra forto tra akvo aŭ aero.
23.	precipe	Ŝ:	frapi forte kontraŭ io; karamboli.
24.	proklami	T:	inteligenta, cel-trafa, ne-stulta.
25.	rifuzi	U:	kun granda ĝojo kaj viglo.
26.	ritme	Ŭ:	bruligi mortan korpon.
27.	senco-hava	V:	tre forta.
28.	suĉi	Z:	perforti, ataki.

iom pli limigita (praktike ĝis kvar) sed en kiu vi rajtas ŝanĝi la proponatajn respondojn por ĉiu demando. La respondojn oni denove per literoj kutimas signi, kaj la demandojn per ciferoj. Oni povas testi leksikon: la demando estas la difino kaj la respondoj kvar simil-sonaj aŭ -aspektaj vortoj (ekz. La unua vekhorloĝo, p. 105 en LLV). En tiu ekzerco kaŝfrazo estas aldonita, sed ne laŭ la identiga litero de la respondoj, ĉar per nur kvar maleblas konstrui sencohavan frazon, sed per sinsekvigo de difinit-vica litero el la respondovorto, kiu kutime ne estas la unua, ĉar ĝuste la kvar donitaj respondoj prefere similu unu la alian. Ĉi tiu ekzerco sekve testas ne nur la konon aŭ rekonon de la bezonata vorto, sed la pli subtilan kapablon elekti la ĝustan vorton el inter siaj aspekte parencaj najbaroj, ekz: imposto, impoŝto, importo, impulso; stalo, ŝtalo, stano, ŝtato, stato. Ĝi povas kontrastigi la danĝer-kazojn de enlingva interfero.

Eblas testi la ĝeneralajn sciojn, kaj kaŝi la ekzercon en formo de kvizo. Tiurilate vidu la kvizon en Juna amiko, 87/4, paĝo 16, kie ĉiu respondo estas unuvorta, kaj la identigaj literoj donas kaŝfrazon.

Oni povas uzi la teknikon por testi la kapablon apliki la gramatikon al konkreta situacio (ekz. Ĉe tunelo, ĉevalo en LLV, p. 146, kiu testis la participajn verbo-tempojn en la kunteksto de la donita rakonto). Por testi nur tiun gramatikaĵon, multobla elektado kun komenca menuo sufiĉas, kaj estas eĉ pli kompakta; sed la aldono de tiu kunteksta elemento postulas la transiron al la uzo de varia menuo. Tiu ekzerco, cetere, montras la maksimumon de la eblo krei kaŝfrazon en la kod-literoj, kiuj tiukaze estis A, B, C, Ĉ, D kaj E. Ĉi tiu ekzerco-formo bone taŭgas por testi komprenkapablon de donita rakonto, ĉar la doneblaj respondoj povas esti eĉ tutfrazaj, deduktendaj, kompleksaj ktp. La kompilanto devas zorgi ĉi-kaze pri kelkaj punktoj: la disméto de la bonaj respondoj devas esti hazarda - nek tro regula, nek tro malregula, la bona respondo ne rajtas evidentigi sin per troa malsimileco al la malbonaj (pro troa longeco, mallongeco, pro alia forma malsameco, ekz. ke la bona respondo komencu per verbo kaj la malbonaj per substantivoj) kaj krome la malbonaj respondoj (forlogilŏj?) devas kuŝi ene de la komprenkapablo de la uzantoj, kaj esti serioze konsidereblaj kiel alternativoj, elimineblaj nur post iom da pensado. Se la "demando" ne estas en demanda formo, sed havas la formon de kompletigenda frazo, ĉiuj el la proponataj respondoj devas taŭge sekvi kaj kompletigi la fraz-komencon, el gramatika vidpunkto. Foje oni malrespektas la supre donitan regulon pri seriozeco de la forlogilo, kaj aldonas malpli seriozan sed amuzan forlogilan respondon, por rekapti la atenton kaj intereson de la plenumanto, kiu povas forvagi dum ĉi tiuj aŭtomataj rutinecaj ekzercoj.

6. Taŭgiga ekzerco: En ĉi tiu tipo oni donas frazon kun spacoj, kaj post ĝi iun elementon, kiun oni devas iel taŭgigi laŭ limigita nombro de eblecoj por enmeti en la spacoj. Ekzemplo estas en Tridek roluloj, p. 54, kie oni traktas la maltransitivigon de verboj per -iĝ-, sed kiu prezentas la duan paŝon, en kiu oni ne nur ekzercas la teknikon fari tion, sed esploras, ĉu la plenumanto komprenas kiam tiu -iĝ-igo de la verbo necesas, alivorte, senti la transitivecon aŭ netransitivecon de la prezentitaj verboj. La ekzerco uzas ĉiam du spacojn, kaj necesas zorgi, ne nur miksi la lokon de la iĝ-verbo (kelkfoje en la unua loko, kelkfoje en la dua) sed aldoni frazojn en kiuj ĉu ambaŭ, ĉu neniu el la aldonendaj verboj estas -iĝ-igendaj. Sekve, kvankam gramatike estas nur du eblecoj, tiu unu aldonita elemento kapablas generi kvar respondvicojn el kiu nur unu ĝustas, t.e. la ebleco trafi la ĝustan respondon hazarde estas malpliigita ĝis akceptebla nivelo. La ekzerco-formon oni povas uzi ankaŭ kun pli ol du taŭgigaj eblecoj, ekzemple ĉe verbo-tempoj -as, -is, -os, -i, -u.

7. Misviculo: En ĉi tiu amuza ekzerco-formo oni donas serion de vortoj, en kiuj ĉiuj krom unu estas sence, forme aŭ gramatike ligitaj. La plenumanto devas decidi, kiu estas la misviculo. Do, ĝi ne nur testas konon de la leksiko, sed postulas plie logikan rezonadon. Komence oni prefere prezentu nur unu kriterion por la komparado, verŝajne la sencan. Poste oni povas prezenti pli komplikajn ekzercojn (ekzemple La unua vekhorloĝo en LLV, p. 148) en kiu ne nur la kriterio multe varias, sed la kialo povas iĝi tre subtila. Problemo unuavice de ĉi tiu ekzerco-formo estas la multeco de uzeblaj kriterioj, tiel ke lerta studento povas per torda logiko pravigi elekton de preskaŭ iu ajn el la prezentitaj vortoj. Kaŝfrazo povas tamen redirekti la studenton al la "misviculo", kiun celis la preparinto. Ĉi tiu ekzerco-formo (kiel multaj) estas du-nivele ekspluatebla - kaj aŭtomate (en kiu gravas nur elekti la ĝustan respondon) - kaj produktive, se oni donas la aldonan taskon post la elektado **klarigi** la malsamecon de la "misviculo". Tiukaze, la ebleco de pli ol unu bona respondo ne plu ĝenas, kaj estas eĉ ekspluatebla por diskuti, kiuj el la konkurencaj logikoj estas pli logika.

8. Serioj: Ĉi tiu ekzerco-formo taŭgas por firmigi la konon de fermitaj serioj lernendaj frue en la kurso (monatoj, tagoj, sezonoj, kompas-direktoj ktp.) kaj estas suplementeblaj per simplaj aritmetikaj serioj, kiuj firmigas la manipuladon de la ciferoj. Ekzemplo troviĝas en La laŭta vekhorloĝo, p. 42.

9. Reordigo: Ĉi tiu tipo taŭgas por revizii la tutecan komprenon de legita teksto kaj precipe taŭgas se tiu teksto havas serian aŭ

epizodan karakteron. Oni resumas la rakonton en ne pli ol dudek frazoj (kiuj povas esti rekte prenitaj el la rakonto, aŭ kiuj pli bone kondensigas ĝin, ne estintaj mem en la origina teksto). Poste oni miksas la ordon de tiuj frazoj kaj la plenumanto devas reordigi ilin. Tio bezonas multan pensadon, kaj la kapablon ne nur kompreni la frazojn, sed memori kaj uzi tiun komprenon. Ekzemploj troviĝas fine de La laŭta vekhorloĝo, p. 50 kaj fine de Frapo ĉe la pordo, p.54 en Pordoj.

10. KREVO-versoj: Ĉi tiuj prezentiĝas en la formo de duliniaj versaĉoj, kies lastan vorton forŝtelis la agentoj de kultur-protekta organizaĵo "KREVO". La plenumanto havas la taskon reenskribi la mankantan vorton, helpata de la senco de la poemo, kaj de la forma simileco kun la lasta vorto en la linio supre. Ekzemplojn trovu en TR, p. 64, Pordoj, p. 55, LLV, p. 42 kaj La heroo, en LLV, p. 179.

B: Duon-aŭtomataj ekzercoj

Ĉi tiuj ekzercoj postulas mallongajn respondojn, eble nur kelk-vortajn, sed iliaj formoj ne estas tute fiksitaj; pli ol unu respondo povas esti ĝusta. Sed ĉar la tasko estas iom difinita, la eblecoj por respondi ne estas senfinaj, kaj la respondoj estas iom rapide korekteblaj. Ili estas kaj skribe kaj parole plenumeblaj.

1. Kompletigu la frazon: La kompletigo povas postuli nur unu vorton; tiukaze la ekzerco estas aŭtomata, sed kutime ĝi postulas kelkajn vortojn, kiuj ne estas rekreeblaj el la unua parto de la frazo. Taŭgaj vortoj por fini la fraz-komencon estas "kiam", "ĉar", "pri", "pro", "per", "kun" ktp. Ekzemplo: Tridek roluloj, p.17 kaj 38.

2. Fraz-generilo: Ĉi tio uzas la simplan ekzerco-tipon, sed apartigas tiujn lastajn ligvortojn disde la ceteraj fraz-komencoj. Do, se la ekzerco prezentas dek fraz-komencojn, kune kun dek ligvortoj, oni povas per ĉiuj kombinoj generi cent finendajn frazojn. La kompilanto devas tamen zorge prepari kaj testi la ekzercon, por certiĝi, ke ĉiuj kombinoj liveru sencohave fineblajn frazojn. Ekzemplo estas en Pordoj p.53, Tridek roluloj, p. 50.

3. Modifaj ekzercoj: Ĉi tiuj ekzercoj celas firmigi la kapablon ŝanĝi unu strukturon en alian, kaj estas uzeblaj por plej diversaj gramatikaĵoj: komparacio (Pordoj p.15), de transitiva al netransitiva verbo (Tridek roluloj, p. 38 kaj LLV, p.47), kreo de -iĝ-formoj el verboj aŭ adjektivoj (Tridek roluloj, p. 50), kaj nia lasta

ekzemplo montras, kiel oni povas postuli plurajn transformojn de la samaj frazetoj: el prezenca verbo kreu la ordonon, la demandon, la negativon, la futuron, la pasintecon (Tridek roluloj, p. 17).

4. Evoluigaj serioj: Ĉi tiuj estas specoj de transformo, sed la transformenda elemento varias. Ĝi fakte estas speco de programita lernado, aŭtomata en la senco, ke la plenumanto povas tuj kontroli la ĝustecon de sia respondo antaŭ ol pluiri, sed ne tute aŭtomata pro tio, ke la respondo estas tutfraza. Oni ricevas serion de similaj frazoj unu sub la alia. Ĉiujn krom la plej supra oni devas kovri per kartonpeco. Fine de tiu frazo staras interkrampe vorto, kiu signalas la bezonatan transformon. La plenumanto rediras la frazon ŝanĝanta tiun petitan elementon, kaj per mallevo de la kartonpeco je unu linio, povas kontroli mem la ĝustecon de la respondo kaj jam trovi la indikon, laŭ kiu necesas modifi la duan frazon. Plenumanto povas dum memlernado testi sin, kaj kontroli kiomlonge necesas, por tralabori la tutan ekzercon. Ekzemploj estas en Tridek roluloj, p. 62, LLV, p.40, kaj kun iom alia metodo en besta kunteksto en Juna amiko 88/2, p.12.

C Ne-aŭtomataj ekzercoj

Ĉi tiuj bezonas plenfrazajn respondojn, aŭ eĉ la kapablon formuli kaj komuniki kompleksajn nociojn. Ili povas preni demandan formon, ĉu pri rakonto, ĉu pri la vivo de la plenumanto, ĉu pri ĝenerale konataj temoj. Iuj demandoj estas pli simple respondeblaj ol aliaj, tiujn ni uzu frue en la kurso aŭ komence en la ekzerco. Tipaj demando-vortoj estas "Kio", "Kiu", "Ĉu", "Kiom da", "Kie" ktp. Tiukaze la granda plimulto de la respondo estas jam trovebla en la demando, la plenumanto devas kutime aldoni nur unu vorton da freŝaj informoj. Pli postulaj estas la demandoj pri motivo, maniero, komparoj, deduktendaĵoj, supozoj ks. Tiukaze la demando donas nur etan parton de la respondo; la plenumanto devas efektive elkovi el sia lingvo-scio la elementojn por formi la respondon. Tre produktivaj estas demandoj starigitaj per "Kiel", "Kial", "Se X, kion vi farus?" aŭ "Se Y, kiel vi sentus?" aŭ "Se Z,

La verkoj aluditaj en ĉi tiu artikolo estas la jenaj:
Tridek roluloj, eldonis TEJO, 1981. 72p. Ilus. Kvar simplaj teatraĵetoj kun demandoj, ekzercoj, ludoj, unulinvga vortlisto kaj notoj por instruisto. 8,10 gld. ĉe UEA.
Pordoj, eldonis Stefeto, 1984. 84p. Ilus. Dek mallongaj dialogoj aŭ teatraĵetoj, ĉiuj kun ekzercoj diverstipaj (multaj por stimuli grupan diskutadon) kaj aldone du pli longaj teatraĵoj ankaŭ kun suplementa materialo. Vortlisto kaj notoj. 8,10 gld. ĉe UEA.
La laŭta vekhorloĝo ... kaj aliaj atentokaptiloj, eldonas Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 200p. Ilus. Reverko de la jam aperinta rakonto "La laŭta vekhorloĝo" plus tri pliaj: "La unua vekhorloĝo", "Ĉe tunelo, ĉe valo" kaj "La heroo". 80 paĝoj da demandoj, ekzercoj kaj aktivaĵoj, 8 rol-ludoj, vortlisto, notoj. 21,00 gld. ĉe UEA.

kaj vi estus A, kiel vi reagus?" ktp. Aldone al tiuj eblecoj starigi demandojn, estas aliaj ekzerco-formoj:

1. Diversaj utilaj formuloj: Por kio oni uzas ...? (LLV, p.40) Kial famiĝis ...? (LLV, p.38) Kiel funkcias ...? (LLV, p. 183) Klarigu la signifon de ... (LLV, p. 31) Kio estas la diferenco inter X kaj Y? Kio estas la simileco inter X kaj Y? (Pordoj, p. 53), Ĉu oni povas inventi X, sen inventi Y? (La unua vekhorloĝo en LLV, p. 94) kaj samloke "Kiuj estas la dek plej gravaj inventaĵoj el la homa historio?" kiun oni devas decidi unuope, poste diskuti pare kaj fine decidi tutgrupe.

2. Ruzaj respondoj: Ĉi tio estas iom ludeca ekzerco, kiu postulas multan fantazion. Oni ricevas demandon respondendan per iom da frazoj. Post ĝi aperas du aŭ tri radikoj, ne nepre rekte ligitaj al la temo de la demando. La plenumanto devas respondi la demandon uzanta tiujn radikojn. Vidu TR, p.51.

3. Bild-priskribo: Eblas plenumi ĉi tion skribe aŭ parole, unuope aŭ grupe. La bildoj havu dinamikan aŭ serian enhavon, ne nur priskriban. Ekzemple la kvar bildoj en serio en Juna amiko, p87/3, p. 24. Simile la kvar kovrilaj bildoj de la jarkolekto 1988 de Juna amiko estas priskribeblaj, sed tiukaze la tasko estas strukturita per demandoj. La bildoj estas ĉiuj dupartaj, kaj la dua, komence kaŝita parto prezentas iun surprizon aŭ evoluon neatenditan el la unua bildo. Paranteze bonega ekzerco estas formebla el la desegnaĵa bazo de bildstrio, t.e. la desegnaĵoj kun la parol- kaj pens-bobeloj, sed sen la teksto. La plenumantoj devas laŭ la bildoj imagi la rakonton kaj dialogon. Kelkaj plenumantoj laborantaj sendepende kapablas krei malsamajn rakontojn laŭ la samaj bildoj. Tion pruvis utiligo de la bazo de la bildstrio "La domo kun oraj fenestroj" (Juna amiko 88/3).

4. Rol-prenoj: Ĉi tiuj estas antaŭpreparaj paŝoj por la plenumo de formalaj rol-ludoj (vidu IPR 88/1) Oni ricevas situacion simplan, kiun oni devas enscenigi ("Iu forgesis ion" en Juna amiko 88/2, p.7) aŭ en kiu oni prenas rolon kaj devas ion demandi, peti, klarigi aŭ postuli de iu alia, ekzemple laŭ la situacio de legita rakonto (Pordoj, p. 75 kaj LLV, p. 183).

5. Eseo: Ĉi tio donas preskaŭ senliman eblecon por esprimado, ĉu fakte, fikcie, serioze, leĝere. Pri tiu lasta ekzemplo estas en Pordoj sur paĝo 78 kaj en La laŭta vekhorloĝo, p. 31 kaj 48.

Jen ni skizis tutan gamon da eblaj formoj, per kiuj la instruado povas esti varie kaj sen uzo de nacia lingvo ekzercata, de la plej simplaj "Jes/Ne" tipoj, ĝis la plej kreivaj kaj postulaj.

Recenzo:

"EN NOVAN MONDON", rektmetoda kurso por geknaboj, de Vilma Sindona EICHHOLZ, Esperanto press, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO, 1986. Prezo: 50 usonaj dolaroj (+ 6.58 por sendkosto). La materialo nepre bezonata de la lernanto kostas US$ 3.-

Jen nova rektmetoda kurso, pri kiu jam aperis recenzo en "Heroldo de Esperanto" (n-ro 1767, p.4) kaj "Monato" (n-ro 10, 1986).

La kompleta metodo konsistas el ses teksto-kajeroj de +- po 60 dense presitaj paĝoj, unu "lernvort-kajero" por la teksto-kajeroj 1 kaj 2, unu kolekto da "paroligiloj", unu gvidlibro kaj du 90-minutaj kasedoj + 2 ludoj. La celgrupo estas 12-14-jaraj geknaboj.

La ĉi tie prezentita kurso estas ne nur lingvo-kurso, sed ankaŭ – oni devas fakte diri: sed precipe – unu longa krio de fido al la forto de l'edukado al la bono, la belo kaj la vero. La entuziasmo kaj la idealismo de la verkintino tute bone enkadriĝas en la internan ideon de Esperanto kaj eĉ skeptikuloj, eble post unua nekredema aŭ sarkasma reago fronte al tiom da idealismo, eĉ skeptikuloj povus senti sin finfine kuntrenitaj kun la fajro de tia neŝancelebla kredo. Kun nekutima energio kaj konvinko ŝi volas konsciigi sian junan publikon pri la plej gravaj problemoj, kiujn la homaro devas alfronti: la pacema kunvivo, unue inter la homoj kaj due, kun ĉio, kion nia jam tiom difektita planedo portas. Ŝi estas "absolute konvinkita, ke transdonante pozitivan sintenon al junaj homoj, ni atingos, ke la generacioj de morgaŭ havos pli pacajn sintenojn kaj elektos pacajn gvidantojn". Ŝi eĉ volas parte rekrei la mondon konsilante, ke ĉiuj partoprenantoj en la kurso elektu por si novan nomon, iom korektante tiamaniere la hazardon de sia estiĝo. Ĉu naiva ludo? Ne tiagrade, se oni konsideras, ke rol-ludoj estas grava parto de la psikologia grupo-pritraktado kaj ke ankaŭ la sugestopedio de d-ro Lozanov inkluzivas la elekton de nova personeco. Fakte, ĉia lingvokurso reprezentas socian modelon. Tiu ĉi estas ne nur priskriba sed ankaŭ konstruema. La tuta verko spiras la senbridan volon influi pozitive la infanojn per favora etoso kreita en la kurso kaj per la forpelado de ĉia negativa impreso.


Unu kontrasto en la verko estas, ke tiu pasia inspiro tamen ne malhelpas, ke la verkistino precize priskribas la kondiĉojn, en kiuj oni uzu la kurson: celgrupo, ĝia aĝo, necesaj pedagogiaj kaj moralaj kvalitoj ĉe la instruanto. Krome, ŝi penis aldoni al la vortoj de la "lernvort-kajero" (tipe germana esprimmaniero!) ilian oftec-indicon. Nun, estas konate, ke tiajn oftec-indicojn

oni konsideru kun la necesa rezervo, ĉar la relativa ofteco dependas ja de la elekto de la analizita materialo. Ili tamen utile konsciigas la instruanton pri la relativa graveco de tio, kion li instruas. Precizan priskribon ricevis ankaŭ ĉiuj aktivaĵoj proponitaj, tiamaniere, ke la gvidanto povas havi klaran ideon pri ilia sinsekvo kaj ilia alternado.

Alia kontrasto en la kurso estas unuflanke la romantika entuziasmo kaj aliflanke la pedagogia prudento, kiu gvidis la verkintinon en la unuaj paŝoj de la metodo, irante de la "montrada fazo" tra la "patrina fazo" ĝis la fazo de la "pasiva difinado". Alia signo de prudento: dum ŝi ekspluatas la akiraĵojn de la rekta metodo, ŝi ne hezitas disponigi lernmaterialon legendan hejme kaj vortlistojn kun traduko. Cetere, en la gvidlibro svarmas la praktikaj konsiloj, kio montras, ke ŝi konas sian fakon kaj parolas nur el propra instrusperto. Tiu prudento denove kontrastas kun (laŭ mia taksokapablo) troa optimismo pri la lerneblecoj de la infanoj, sed oni ĉiam devas rememori, recenzante tiun ĉi kurson, ke la aŭtorino antaŭsupozas ĉiutagan kontakton kun la gelernantoj; instrukondiĉo, kiun nur malmulte da kursgvidantoj renkontis en sia kariero!

Agrabla por mi estas la kontrasto inter la etoso de iom naiva, eksmoda amemo kreanta mondeton, kie ĉiu estas bela kaj bona kaj ĝentila unuflanke kaj la moderneco (kaj finfine la realismo) de la proponataj celoj. Efektive, nur tre malrapide disvastiĝas inter la homoj, kaj precipe inter niaj politikaj "gvidantoj", la konscio, ke nia planedo estas respektenda, se ni ne volas trasegi la branĉon, sur kiu ni sidas. Greenpeace ĵus lanĉis kiel lastan sloganon, ke nia tuta planedo estu nia natur-rezervejo. La aŭtorino ne diras alion.

Ĉu vi volas vojaĝi aŭtobuse aŭ trajne? - Ĉu per ŝipo aŭ avio? - Ĉu neniu el vi volas vojaĝi bicikle aŭ ĉevalĉare?



aviadilo, avio

ŝipo

trajno

aŭtobuso, buso

motorciklo

La kajeroj ne estas veraj lernolibroj. Ili plej ofte prezentas la konversacion, kiun la instruanto havos aŭ havis kun sia klaso. Ili permesos al la (bonvolaj) lernantoj relegi kaj retravivi la lecionojn. La unuaj du kajeroj sekvas pli-malpli progresivan linion, sed la instruanto devas plej ofte inventi mem prezentadon, fiksadon kaj ripetadon de la lernmaterialo. Krom tiuj teknikaj konoj, la gvidanto devas kapabli "establi emociajn kontaktojn kun la kursanoj". Ne necesas diri, ke la kurso "En novan mondon" estas postulema! La proponitaj aktivaĵoj estas grandnombraj, i.a. bastladoj, diskutoj, enigmoj, gimnastiko (kial ne?), rakontoj, kantoj (multegaj, iom tro da germanaj laŭ mia gusto), langorompiloj, ludoj (multegaj), poemoj, skribtaskoj (malmultaj), teatraĵetoj, travivaĵoj de lernantoj, ktp. La kurso estas do bunta aro da aktivaĵoj kun komence rapida rektmetoda prezentado de la bazaj gramatikaĵoj. La instruanto aldonu laŭbezone, kaj en la limoj de sia profesia lerteco, ĉion necesan por certigi firman akiron de la lernmaterialo. En la tria kaj kvara kajeroj tiuj aktivaĵoj alternas kun 18 lecionoj pri gramatiko, kies celo estas analizi sisteme la lingvajn mekanismojn, kiujn la infanoj supozeble akiris nekonscie dum la tralaborado de la unuaj du kajeroj.

En la kvina kaj sesa kajeroj jam ne plu estas gramatikaj lecionoj. La kvina kajero pritraktas precipe la vivon de Zamenhof kaj felietonan rakonton, dum la sesa koncentriĝas sur kelkajn bazajn konceptojn pri lingvistikaj problemoj kaj sur psikologiajn problemojn kiel, ekzemple, la memanalizo. Ĉiu kajero estas en formo de diskuto kun aŭ inter la infanoj.

La libreto "Paroligiloj" konsistas el disigeblaj kartoj montrantaj bildojn, ordonojn kaj bildrakontojn. En ĝi estas ankaŭ kuponoj, kiujn ricevas meritplena lernanto kaj kiu rajtigas lin fari ion apartan dum la kurso.

Du kasedoj de po 90 minutoj alportas kantojn, magnetofonajn programojn, teatraĵetojn kaj poemojn. La aŭtorino legas kaj kantas klare kaj esprimplene, la aliaj voĉoj estas bedaŭrinde tre amatorecaj. Iu voĉo havas fortan germanan akcenton kaj pronocas gorĝan R-on anstataŭ la konsilinda rulata.

La gvidlibro plej plaĉis al mi. Ĝi ampleksas 150 paĝojn kaj estas riĉega fonto de valoraj konsiloj pri la instru-arto. Mi opinias, ke ĉiu instruanto povas legi ĝin kun profito. Oni trovas en ĝi i.a. la pravigon de la filozofio, sur kiu baziĝas la kurso, konsilojn pri ĉiuj lerneroj, praktikajn instrukciojn por fabriki pupojn kaj didaktikajn ilojn kaj multe da aliaj artifikoj por kapti la atenton de la klasanoj kaj gajigi la instruadon. En la ĉapitro "Neologismoj" la verkintino detale klarigas, kial ŝi decidis enkonduki tri novajn lingverojn: la pronomon "ŝili", la prefikson "go-" kaj la sufikson "-uno". Ĉiu prijuĝos tiun iniciaton laŭ sia propra temperamento. Tamen, miaopinie oni povus trovi multe da aliaj nuancoj ne esprimataj en Esperanto per afiksoj aŭ gramatikeroj. Se oni volus priatenti ilin, oni malsaĝe malfermus la pordon al lavango da neologismoj laŭ ĉies persona inklino.

Konkludante mi dirus, ke la kurso "En novan mondon" reprezentas ege personan kaj laŭdindan provon eduki infanojn al la stato de monda civitano. Estas klare, ke neniu argumento povos pledi por ĝi ĉe homoj, kiujn ne inspiras tia alta idealo. Ĉiu instruanto, tamen, povos multe lerni el la metodo de s-ino Eichholz. Precipe, eble, ke plej gravas la kapablo demeti siajn malnovajn, tradiciajn refleksojn kaj sin malfermi al "nova mondo".

E.VAN DAMM

ZSUZSA BARCSAY

TRADICIAJ KAJ MODERNAJ INSTRUMETODOJ DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

estis la kadrotemo de la 22-a Internacia Konferenco de ILEI (1988-07-16/23, Kerkrade, Nederlando). Partoprenis ĝin ĉ. 55 instruistoj/kursgvidantoj el 16 landoj (inter ili ekz. ankaŭ Sovetunio, Ĉinio, Tanzanio, Zairio, Nigerio k. a.), krome utiligis la okazon akiri spertojn en E-komunumo ĉ. 45-persona grupo de italaj interesiĝantoj, do entute ĉ. 100 personoj.

La ĉi-jara konferenco havis tri grandajn celojn:

1) kiom eble plej bone disvolvi la kadrotemon;
2) laŭvice elekti novan estraron;
3) pridiskuti kelkajn akute aktualajn farendaĵojn, inter ili la sistemon de ekzamenoj, krome interkonsenti pri strategio kaj taktiko de la informa kaj pedagogia agado.

La faka programo konsistis el 15 prelegoj/prezentoj, ĉiuj kun praktika karaktero: pri konceptoj, vojoj, metodoj sugestopedia (BACEV), kreiva (HOEKSTRA), "pirata" (HORVÁTH), "zagreba" (TIŠLJAR); situaci-komunika (MACGILL). CHILDS-MEE plenumis la enkondukan prelegon, krome ŝi prezentis aŭdvidan filmon pri/kun rekta metodo por komencantoj; KEEFE skizis sistemon de plurtavola E-kursaro kaj prezentis grupan lernadon de fremda lingvo; EICHHOLZ prelegis pri terminologio kaj pri la Bildvortaro de Eo redaktita kaj ĵus eldonita de li mem; GERRITSE stimulis pensojn – donante kelkajn bonajn ideojn – kiel testi lernolibrojn; HORST-KOLINSKA pri la neceso de kompleto de modernaj instruiloj kaj pri la ĝisnunaj rezultoj tiukampe ĉe la Cseh-instituto; MELNIKOV aktivigis la partoprenantaron per tiuj didaktikaj ludoj, kiujn li aplikas instruante geknabojn; BARCSAY prezentis du diversajn AV-kasedojn:

"Bildoj pri Hungario" servas lingvoinstruadon/-lernadon en meza kaj supera lingvokursoj – kun prilaboro de unu konkreta leciono,

"Instruado en la praktiko" (8 instrŭhoroj de diversnaciaj instruistoj) estas didaktika helpilo por instruistoj/kursgvidantoj, resp. por kvalifikaj kursoj. (Tiun ĉi kasedon produktis la Hungara Sekcio de ILEI en 1987/88.)

La elekton de nova estraro preparis kaj la proceduron gvidis porokaza komisiono (BARCSAY, DE LORENZI, WERDIN). La unuan fojon en ILEI okazis plurala kandidatigo, kio ebligis veran elekton, ne nur baloton. Novaĵo estas ankaŭ la pliampleksigo de la estraro: anstataŭ la ĝisnuna 5-persona nun 7-persona korporacio gvidas la Ligon (kiu ja ĝojige kreskas). Mi prezentas la novan estraron:

Prezidanto: SYMOENS, E. (Belgio).
vicprezidanto: MACGILL, S. (Hungario).
ĝenerala sekretario: CHILDS-MEE, A. (Nederlando).
vicsekretario: JONES, M. (Britio).
estrarano pri financaj aferoj: ANDREASSON, B. (Svedio).
estrarano pri pedagogiaj kaj ekzamenaj aferoj: dr. DAHLENBURG, T. (Germana DR).
estrarano pri ekstereŭropaj aferoj: ZHANG, D.(Ĉinio).

Adresojn kaj pli detalan task-disdividon vi trovos kovrile de ĉi tiu numero.

La Ligo dankis pro la sindona laboro al s-ino Catina DAZZINI, estinta ĝenerala sekretario kaj nomumis ŝin honora membro de ILEI. La sama honorigo estis aljuĝita al la karmemora dr. István SZERDAHELYI, antaŭa prezidanto de ILEI. Symoens, kiu en la antaŭa periodo estis vicprezidanto – pro la ege bedaŭrata forpaso de prof. d-ro SZERDAHELYI – efektive jam pli frue plenumis la taskojn ankaŭ de prezidanto. Li preparis 11 labordokumentojn por la konferenco pri 1/ IPR; 2/ eldonaĵoj de ILEI; 3/ ŝanĝoj de la statuto kaj de la regularo; 4 / Centra Oficejo de ILEI; 5/ konferencoj de ILEI; 6/ disdivido de la taskoj; 7/ kunlaboro kun TEC; 8/ la Lerneja Projekto; 9/ kultura evoluigo; 10/ Centro Zamenhof en Bjalistoko; 11/ informado en pedagogiaj kaj edukaj medioj. Tiujn temojn la konferenco traktis aŭ en la pleno aŭ en malpli grandaj laborkolektivoj.

En la absoluta centro de la konferenco tamen staris la kvalifikado de kursgvidantoj (spertoj de la ĵus pasinta 1-a internacia metodika kurso en La Chaux-de-Fonds, kiun gvidis s-ino SZANSER laŭ la kursmaterialo kompilita de ŝi) kaj la estontaj diversgradaj ekzamenoj de ILEI, kaj la strukturo de la Internacia Ekzamena Komitato. Ties prezidanto fariĝis d-ro DAHLENBURG.

La LKK (MENSEN, HORST-KOLINSKA, v. d. HORST, LUESKEN-BURGER, GERRITSE kaj aliaj nederlandaj gekolegoj) faris ĉion eblan por disponigi maksimume bonajn kondiĉojn por la konferenco, ebligi kulturajn programerojn (aldone al la modela organizado de la fakaj), gastigi abunde kaj elegante kaj krei sincere amikan, reciproke respektoplenan atmosferon.

KIAL MOTIVADO?

Arnold Pitt, Britio

La sekva kontribuaĵo ne celas esti ampleksa aŭ oficiala detaligo de nia venonta konferenca temo en Caerleon. Ĝia celo estas jam nun sproni nian pensadon kaj esti invitilo al debato sur la paĝoj de IPR *prepare al la venontjara diskutado. Ĝi estas do samtempe inivitilo al vi aktive kaj preparite partopreni en la pritema parto de la konferenco. La aŭtoro estas nia brita sekciestro.*

Dum nia ĉi-jara konferenco en Kerkrade kelkaj partoprenantoj demandis kio estas la celo de la temo de la konferenco en 1989. Ĉi tie mi, kiu proponis la temon, provas ekspliki miajn ideojn pri tiu temo. Dum la memorinda mateno de la Tago de la Lernejo en Varsovio la leksiisto Stefan MacGill forte impresis min kaj super ĉio frapis min la ideo, ke la motivado en la lernado de Esperanto devas esti io alia ol la motivado por aliaj studobjektoj kaj eĉ alia ol por aliaj lingvoj. Jam tiam en 1987 oni ekpensis pri ILEI-konferenco en Britio dum 1989, kaj ŝajnis, ke *motivado* estos taŭga temo por tiu konferenco. Interkonsente kun Edward Symoens ni elektis tiun temon kaj ĉi tie mi volas enkonduki kelkajn el la aspektoj de motivado, kiujn ni esperas diskuti venontjare en Caerleon.

Se oni lernas etnan lingvon oni povas supozi, ke iam la lernanto vizitos la koncernan landon kaj uzos la lingvon. Tamen, multaj tion ne faras, kaj inter tiuj, kiuj fakte tion faras, multaj probable nur fuŝparolos la lingvon sufiĉe por aĉeti tason da kafo.

Oni ne povas supozi, ke en la nuna mondo, lernanto finfine gajnos sian vivtenon pere de Esperanto, aŭ eĉ, ke ĝi estos kutima helpilo en la profesia vivo. En multaj landoj ĝi eĉ ne povas esti parto de la nacia ekzameno je la fino de la lerneja jaro. Oni ne rajtas supozi, ke la gepatroj forte aprobos, ke siaj gefiloj lernu tiun idealisman lingvon.

Kvankam ILEI kaj ĝiaj landaj sekcioj forte kredas, ke Esperanto havas edukan valoron kaj ke indas instrui ĝin, ni devas reveni al la kerna demando — kiel ni instigos:

- la lernantojn eklerni la lingvon?
- la lernantojn ellerni la lingvon?
- la lernejestrojn kaj estraranojn de edukaj servoj enkonduki la lingvon
- la labor-donantojn **valorigi** la lingvon minimume samnivele kiel aliajn stud-objektojn?

Ekzistas certe kelkaj aspektoj de Esperanto, kiuj helpos al ni kaj ĉiuj esperantistaj instruistoj sendube konas ilin, sed ĉu ni sufiĉe uzas la fortecojn de la lingvo kaj ĝia movado? La lingvo estas strikte regula kaj tial estas pli facile lernebla ol etnaj lingvoj. (Bonvolu noti, ke mi ne skribas "ĝi estas facila" ĉar por tiuj, kiuj lernas ĝin kiel unua fremd-lingvo ĝi ankaŭ prezentas malfacilaĵojn.) Ĝi estas granda helpilo en komprenado de la strukturo de la denaska lingvo de la lernanto. Per siaj klopodoj, la instruisto de Esperanto povas malfermi fenestron al kontaktoj tra la tuta mondo. Ekzistas la Delegita Reto, la Koresponda Servo Mondskala, Geonkloj Esperantistaj, la Kastora Klubo ktp.

Ĉiuj el tiuj povas helpi la motivadon ... *sed* ... la ĉefa motivado estas bona instruado farata de kapabla instruisto en la klasĉambro. La infanoj (kaj en aliaj cirkonstancoj la plenaĝuloj) devas antaŭĝui la lecionojn de Esperanto. Do, unu el la ĉefaj temoj de la Konferenco en Caerleon certe estos kiel igi la lecionojn de Esperanto ĝuindajn kaj eĉ amuzajn. Se ni intencas diskuti la ĝuindecon de la instruado oni rajtas esperi, ke la ideoj amuzos ankaŭ la partoprenantojn de la Konferenco. Espereble la tuta konferenco estos tiom ĝuinda kiom la mateno de la Tago de la Lernejo en Varsovio.

Ĉu vi povos kontribui ideojn aŭ montro-lecionon? Se jes, bonvolu turni vin al estraranoj de ILEI aŭ rekte al la Loka Konferenca Komitato de la konferenco.

(La adreso de la aŭtoro kaj LKK-ano estas: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Hfds. Britujuo, HR6 8QD.

23a Konferenco de ILEI:

CAERLEON, KIMRIO (5a ĝis 12a de aŭgusto 1989)

La konferenco okazos tuj post la Universala Kongreso en la historia urbo Caerleon en suda Kimrio. Ĝi situas ĉirkaŭ dek kilometrojn de Newport, kiu estas atingebla trajne de Londono en proks. du horoj. La urbo Caerleon estis fondita en la jaro 75 P.K. kaj ĝis la kvara jarcento kreskis ĝis fortikaĵa urbo kun 5600 soldatoj. Unu angulo de la urba muro estas renovigita, kiel ankaŭ la romia ampiteatro. La urbo krome ligiĝas al la legendoj de Reĝo Arturo kaj la rond-tablaj kavaliroj.

Petu la unuan bultenon de la kongreso de la supra adreso, kiu indikos kostojn, la loĝkondiĉojn en agrabla kolegio kaj aliajn praktikajn detalojn. Pri la temo vi povas legi supre.

ĜIS REVIDO EN NIA KONFERENCO EN HISTORIA CAERLEON!

ESPERANTO EN LA DUA JARCENTO

Organizita de Hungara Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro, sub la aŭspicio de TEJO, la konferenco kun tiu titolo okazis la 13–16-an de julio en Szeged, Hungario. La diskutoj grupiĝis ĉirkaŭ kvar demandoj:

a) Esperanto fronte al la instituciaj strukturoj de la makrosocio: kia publikrilata strategio por la dua jarcento?
b) Esperanto – inter societo(j) kaj komunumo: kia organiza strategio por la dua jarcento?
c) Kia surmerkatiga strategio?
d) Kia lerneja/faka strategio?

Kvankam nian legantaron tuŝus ĉefe la temo d, ĉi-sube ni povas represi koncizigite la t.n. "konkludan diskutmaterialon" nur pri la unuaj du demandoj, ĉar pro tempomanko simila protokolo pri la temoj c-d ne estis kompilita.

A. 1. Esperantio...aspektas, kompare kun la makrosocio, anticipe alternativa modelo.

2. La diversaj novtipaj socimovadaj organizaĵoj (NSO) (ekz. la novaj pacaŭ la ekologiaj movadoj por kiuj la ŝtata nivelo estas malpli grava), bazitaj sur la slogano "pensadi globe, agi loke", akcelas la disvolvon de alternativa modelo publikrilata. Dum la tradiciaj movadoj agas kiel premgrupo por konvinki institucion pri sia modelo, kaj pere de la institucio konvinki la homojn – la NSO-j funkcias mem kiel modeloj por aliaj homoj(...) Tradicie, ju pli multaj ni estas, des pli forte ni povas premi – novtipe, ju pli multaj ni estas, des pli multaj vivas laŭ niaj principoj.(...)Eksteren, la tradicia pensmaniero estas kompromisema – la novtipa, ne; internen, la tradicia pensmaniero estas disciplina – la novtipa, tolerema. Tradicie, de iu kerno disbranĉiĝas diversaj strukturoj laŭ piramida modelo – novtipe, ekestas pluraj sendependaj unuoj, diversloke iniciatitaj, disvolviĝantaj laŭ horizontala reta modelo.

3. Esperantio favoras konduton laŭ la NSO-modelo. Oni konsciiĝu pri tio.

B. 1. Ekde 1988 ni povas paroli prį efektiva esperantistaro. Ĝi prezentas du facetojn, tuj de la komenco: societa kaj komunuma.(...) La membrecon en la societo atestas la pago de kotizo; la apartenon al la komunumo legitimas la lingvokono, ne la abonkotizo.(...)

2. Inter la societa kaj komunuma facetoj ekzistas, ekde la komenco, nur parta koincido. (...)La societa faceto produktas precipe propagandan servon, dum el la komunuma venas precipe kulturaj valoroj. Sociologie, la societa faceto estas precipe norme orientita movado, dum la komunuma faceto estas precipe valore orientita realaĵo.

3. (...)la societa flanko konsideras la lingvon kiel rimedon je la servo de la makrosocio, dum la komunuma sentas kontraston (...) inter la mikro- kaj la makrosocio.

4. (...)ekzemple, unu el la ĉefaj valoroj de Esperantio, la samideana solidareco transnacia, funkcias nur se oni perceptas Esperantion en sia komunuma faceto.(...)

5. Ju pli la societa faceto evoluis kaj ekspansiis, des pli ĝi bezonis piramidan strukturon(...) Aliflanke, montriĝas pli kaj pli evidente, ke la komunuma faceto malkonformas al tiu piramida modelo. (...)

8. Ĝis hodiaŭ la preskaŭ ekskluzive aplikita organiza modelo en Esperantio estas la "funkcia organizo", kiu havas sian akson en la hierarkio. Alternative al ĝi ekdisvolviĝis la "projekta organizo", kiu havas sian akson en la taskoforto (stabo, ene de kiu oni ĉerpas homojn el eventuale malsamaj fakoj por formi celgrupon orientitan al la plenumo de difinita projekto).

La enkondukoj al la kvar temaroj (far Sándor Révész, Giorgio Silfer, Marco Picasso kaj Géza Felső) kaj la intervenoj prezentitaj aperos en volumo kiel aktoj de la konferenco.

MOZAIKO KAJ DISKUTO

Denove en la Universala Kongreso, ILEI prizorgis programon de la "Tago de la Lernejo". Kontraste al pli fruaj "Tagoj", en kiuj la mozaiko de edukaj informoj prezentiĝis posttagmeze, ĉi-foje oni komencis per ĝi – pro salonaj konsideroj. Dudeko da intervenantoj kovris vastan gamon da temoj, iuj pedagogiaj, aliaj pri regionaj novaĵoj, aliaj pri novaj instruhelpiloj. Ne mankis informoj pri ekzamenoj, nek pri la venontaj ILEI-konferenco kaj perfektigaj kursoj.

Posttagmeze pli malgranda publiko dividiĝis en tri grupojn por diskuti la ĝustan strategion enkonduki Esperanton en lernejajn sistemojn, post enkonduka prelego de la prezidanto de ILEI.

Pli da konkurenco de aliaj kongreseroj forrabis multan publikon; estos ŝajne konsilinde estonte kombini la apartan kunsidon de ILEI kun la "mozaika" parto de la Tago de la Lernejo, por bremsi kunven-svarmon. Ni ne raportas pli detale pri la Tago ĉar *Heroldo* kaj *Esperanto* ambaŭ tion jam faris. Denove, la UEA-ILEI ekzameno estis proponita sub la gvido de s-ino I. Szanser; deko da kandidatoj sukcesis je la meza nivelo kaj kelkaj je la elementa.

ILEI-anoj krome aktivis en la gvido de la konversaciaj rondoj, kiuj, spite la fruan komenchoron logis sufiĉajn spertiĝemulojn por devigi la starigon de kvar grupoj.

ILEI TUTMONDE

BRAZILO

La 9-an kaj 10-an de julio okazis *seminario de ILEI*, kadre de la 24-a Brazila Kongreso de Esperanto en Maceió, ŝtato Alagoas. Temo de la seminario: Rolo de la instruisto en la Esperanto-disvastigado. Oni decidis la jenon:

a: Komisiono de lokaj Esp-grupoj vizitos duagradajn lernejojn kaj fakultatojn, petante permeson por prelegi pri Esperanto;

b: La lokaj Esp-grupoj vaste disvastigos konkurson, kies slogano estas: "Lernu Esp-on kaj gajnu vojaĝon";

c: En junio/89 okazos por tiuj, kiuj *de nun* eklernas Esp-on, konkurso: la konkursantoj devos verki pri temo elektita de kvin instruistoj;

ĉ: La plej bonaj konkursintoj estos premiitaj per vojaĝo kaj gastado; estos inter-regiona turismo.

Elvira Fontes

AŬSTRIO

La aŭstria ILEI-sekcio estas malgranda – nur 12 membroj. Unu IPR-ekzemplero sendiĝas al alĝeriano kiel varba donaco.

Ekde 1986 dissendiĝas perkoresponda Esp-kurso, kiu konsistas el entute 19 lecionoj. Ĝi estas senpaga. La lernantoj devas pagi nur la sendokostojn kaj resendi testfolion post ĉiu leciono.

Por la kurso varbas anoncetoj en diversaj gazetoj, kiujn pagas la Aŭstria Laborkomitato Esperanto Centjara (ALEC). Inter januaro kaj junio 1988 aperis 41 anoncetoj; reagis 68 interesiĝantoj. Dum la menciita tempospaco forsendiĝis 700 lecionoj. Momente sufiĉas du kursprizorgantoj: Mag. MAYER kaj KLAG.

En junio, fine de la lernojaro, kvar gimnaziaj klasoj vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno (IEMW). La gelernantoj estis 16- ĝis 18-jaraĝaj.

Mag. Walter Klag

POLLANDO:

Eo en la Pedagogia Altlernejo en Bydgoszcz

Antaŭ naŭ jaroj komenciĝis en Pedagogia Altlernejo en la ĉefurbo de Pomeranujo la unua oficiala Eo-kurso. Ĝi naskiĝis en optimisma kaj inventema etoso, kiu regis en multaj instruejoj.(...)La vojevodia filio de Pola Eo-Asocio en Bydgoszcz kun la Lingvinstrua Fakultato kaj Didaktika Instituto organizis en la Pedagogia Altlernejo en 1985 fakultatan lektorejon. Ĝi estas interfaka, nedeviga kaj

okupiĝas pri: lektorejo por komencantoj kaj progresantoj; Eo-metodiko; elementa kurso; historio kaj socipolitikaj aspektoj de la E-movado; E-literaturo. La studentoj povas ekzameniĝi kaj la ekzamenita fako estas enskribita en la studkajeron. Post la ekzameno ili ricevas atestojn pri dua grado. Kursanoj rajtas instrui Eon en lernejoj kaj kluboj.(...) Studentoj rajtas elekti Eon kiel trian, nedevigan lingvon en tiuj branĉoj, en kiuj tria lingvo estas elektebla, aŭ kiel apartan fakon. Gravaj baroj por la progreso estas, ke la ministeriaj dekretoj kaj aktoj pri mez- kaj altlerneja lingvo-instruado ne metas Eon inter la oficiale instrueblajn lingvojn, sed inter la nedevigajn, apudfakajn lernobjektojn, kaj ke la tuta instruado kaj la rilataj organizaj kaj pedagogiaj taskoj ŝarĝas la ŝultrojn de nur unu persono. Ne aperas signoj, ke la situacio baldaŭ ŝanĝiĝos.(...) Tamen, en la studjaro 1987-88 studis 56 komencantoj kaj 11 progresantoj.(...)El la instrugrupoj eliĝis konstanta informo kaj entuziasmo, kiuj dum la jaroj allogis ĉiam pli da interesiĝantoj al ĝi. Oni esperu, ke varma etoso kaj influsfero de tiu eksperimentejo akompanos nin en la sekvaj jaroj.

Iwona Strachanowska

ĈINIO:

Ecoj kaj taskoj de nedeviga Eo-kurso

Fine de 1982 la antaŭa Ŝtata Ministerio pri Edukado elsendis oficialan sciigon por rekonfirmi Eon unu el la duaj fremdlingvoj, ke ĝi povas servi kiel nedeviga studobjekto en altlernejoj, kaj ankaŭ funkcii kiel unu el la oficialaj ekzamenaj objektoj por diplomi studentojn, promocii funkciulojn kaj varbi esplor-studentojn. Tio fariĝas mejloŝtono de la ĉina Eo-movado: Eo-instruado eniris jam de tiam en la etapon de daŭra evoluo normala el la postlabora kaj neoficiala. Ekde 1983 funkcias oficiala Eo-kurso en kelkdek altlernejoj.(...)Tamen ĉiuj Eo-instruistoj en altlernejoj frontas la longdaŭran problemon de la ekzistado de tia kurso. (...)

Jen kelkaj propraĵoj de Eo kaj de la situacio, kiun ĝi renkontas:

(...)Eo havas relative malmulton pri scienco kaj tekniko.

En la mondo, inkluzive de Ĉinio, plejparto de la homoj ankoraŭ ne konas ĝin. Kompare kun la ĉefaj etnaj lingvoj ĝia efiko estas ne granda.

Ĝi havas neniun fortan apogon potencan aŭ materian de ajna ŝtato aŭ nacio.(...)

Ecoj de nedevigaj Eo-kursoj ĉe ni estas: kiel ĉe la ceteraj duaj fremdlingvoj, same ĉe tia kurso la studentoj posedas jam iom da bazo de la unua fremdlingvo, kiun oni tamen ne alte taksu, krom por tiuj de la fakultato fremdlingva.(...)Tamen kontraste al la unuaj, por E-kurso troviĝas jenaj trajtoj:

Komence de la kurso la studentoj plejmulte komprenas nenion pri Eo: ili alvenas pro scivolemo, aŭ nur por plenumi la studprogramon aŭ por akompani amik(in)on. Fundamente

mankas modernaj elektronikaj instruiloj ĉu enlerneje ĉu ekstere. Oni ofertas nur kelkajn sonbendojn de Eo. Entute, troviĝas multe pli malfacilaj kondiĉoj por la kurso ol la oportunaj. Sed apenaŭ la lernejo ekfunkciigas la oficialan kurson, tio fariĝas fundo tre grava kaj neignorebla por nia laboro.

Taskoj de la nedeviga Eo-kurso:

La reguleco de E-aj gramatiko kaj vortfarado kaj ties elasteco faras la ĉefajn trajtojn kaj avantaĝojn de la lingvo.(...) Tial preni firme la klarigon de fundamentaj reguloj gramatikaj, bazaj radikoj kaj vortfarado kaj ekzercadon per ili...faros la komunan bazon bona unuflanke kaj plialtigos la intereson de la lerno aliflanke.(...)Por la kurso de ĉ. 100 studhoroj, kiun malhelpas multaj malfacilaĵoj, endas kaj eblas postuli nur fundamenton de aŭd-, parol- kaj skribokapablo, ĉefe la legkapablon. Ni emfazas la ligon kun fakaj scioj tial, ke tio koncernas la radikan celon de la lingvo kaj vivon de la kurso. Sen tio Eo...fariĝus hobio...Precipe rilate al la studentoj de fakoj scienc-teknikaj, kiam ili...konscias, ke uzo de Eo taŭgas por ilia faka laboro, leviĝos plu ilia intereso kaj instigiĝos ilia entuziasmo por plua lernado.(...) La vivo de Eo en sia dua jarcento dependos ĉefe de tio, ĉu ĝi povus esti aplikota vaste kaj grand-skale en sciencoj kaj teknikoj.(...)

Shao Rong (Soliva)
(el "La stelo de espero")

FRANCIO:

La fremdaj lingvoj en la franca instru-sistemo

La studado de unua fremda lingvo estas deviga por ĉiuj ekde la unua klaso de la mezlernejo kaj en la tuta daŭro de la lernado en mezlernejo kaj liceo. La studado de dua fremda lingvo estas proponata kiel elektebla fako komence de la tria jaro en mezlernejoj. En la tria kaj kvara klaso de mezlernejoj la unua fremda lingvo povas esti instruata pli intense dank'al pliaj du horoj (sume 5). Studado de tria lingvo eblas kiel libera fako por la lernantoj de la tri liceaj klasoj. Ĝin elektas precipe la lernantoj de literaturaj klasoj.

Kiuj lingvoj estas instruataj?

Nombro: 13 en la postelementaj lernejoj, inter kiuj 7 estas parolataj en la landoj de la eŭropa komunumo, 2 estas slavaj, 2 semidaj kaj 2 aziaj. Por 8 el tiuj lingvoj eblas trapasi 2 dungekzamenojn (CAPES kaj AGREGACIO – dungekzamenoj por liceaj instruistoj): germana, angla, araba, hispana, hebrea, itala, portugala kaj rusa. Du inter tiuj lingvoj dungas je la nivelo de la agregacio (la plej altŝtupa dungekzameno por liceaj instruistoj): la pola kaj la japana. Unu dungas je la nivelo de CAPES: la ĉina. La nederlanda estas instruata de instruistoj sukcesintaj je CAPES en la germana aŭ angla kaj elektintaj la nederlandan kiel kroman fakon. La moderna greka lingvo estas la plej laste allasita lingvo.

Lingvoj allasitaj ĉe ekzamenoj

Krom tiuj 13, 20 aliaj povas esti ekzamenfakoj ĉe la bakalaŭraĵo kiel elekteblaj fakoj, *kondiĉe ke kompetenta ekzamenanto* povu partopreni la ĵurion. Al tiuj 33 fremdaj lingvoj necesas aldoni 8 *regionajn lingvojn* instruatajn kiel duan aŭ trian lingvon; ili povas esti kroma ekzamenfako ĉe la bakalaŭraĵo. Al tiuj 41 fremdaj kaj regionaj lingvoj necesas fine aldoni *nelimigeblan* liston de "patrinaj lingvoj", kiuj, laŭ la samaj kondiĉoj, povas iĝi libere elekteblaj fakoj ĉe la bakalaŭraĵo.

Aldono de la tradukinto: en Francio ekzistas pluraj internaciaj liceoj, kie parto de la fakoj estas instruata en diversaj aliaj lingvoj ol la franca. De tri jaroj ekzistas en multaj mezlernejoj tiel nomataj "trilingvaj" klasoj, kie la gelernantoj eklernas du fremdajn lingvojn ekde la unua klaso. Krome ekzistas "dulingvaj" klasoj, en kiuj la unua fremda lingvo estas instruata intense (5 horoj), foje eĉ alia fako estas instruata en la fremda lingvo. En Elzaco la germana lingvo estas instruata en pli kaj pli multaj elementaj lernejoj ekde la 3-a klaso (CM1), en pluraj lernejoj eĉ ekde la 2-a klaso (CE2).

Kaj Esperanto?

De kvar jaroj Eo estas instruata po tri horoj semajne en la kvar klasoj de mezlernejo en Villefranche-sur-Saone fare de 2 salajrataj instruistoj en la kadro de la normalaj instruhoroj. Pli ĝenerale Eo povas esti instruata en ĉiuj lernejoj ekster la normalaj lernohoroj, de nepagata instruisto. Universitataj Eo-fakoj funkcias en Clermont-Ferrand, Liono, Aix-en-Provence kaj Parizo. (*informoj eltiritaj de la revuo por francaj lingvoinstruistoj LES LANGUES MODERNES*)

tradukis kaj komentis Edmond Ludwig

HUNGARIO:

BUDAPEŜTA ESPERANTO-FAKO

Komenciĝis la nova studjaro de la Esperanto-fako en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en Budapeŝto. Ok studentoj elektis definitive la fakon en septembro. Krome, la nova prepara kurso (en kiu oni lernas la lingvon ankoraŭ sen devigo plenumi la tutan trijaran kurson de la fako) altiris dek novulojn. Sekve en la fako nun studas dudek kvar studentoj. Aldone, ĝi organizas enlandan 3-jaran korespondan kurson por 13 post-diplomaj studantoj, kiuj aldone al la skribaj taskoj, devas viziti la universitaton ĉiumonate por intensa 3-taga ĉeesta programo.

Interesiĝo por internacia koresponda kurso estas granda, kaj peto por ĝia starigo estas transdonita al la kompetentaj instancoj.

Dume en la dua hungara urbo, Debrecen, komenciĝis alispeca kurso sub la gvido de d-ro Meszaros Béla.

En hungaraj universitatoj kaj trianivelaj edukejoj baza lingva studo estas deviga por ĉiu; ĝis nun temis pri la rusa kaj unu alia elektebla lingvo – ĝis nun Esperanto nur teorie figuris inter tiuj. Post multjara klopodado de la debrecenanoj, Esperanto estas aldonita al la lingvoj dualoke elekteblaj en la Universitato de Debrecen (KLTE). Krome ekde la nova jaro oni antaŭvidas, ke la rusa ne plu sola okupos la unuan elekton, sed aldoniĝos kelkaj pliaj lingvoj. Tiu variigo kaj plia elekteblo devos favori Esperanton en universitataj medioj.

INTERNACIE:
ALIRO AL EŬROPA KOMUNUMO

En letero de la 14a de oktobro, la prezidanto de ILEI, s-ro Edward Symoens, turnis sin al la prezidanto de la komisiono de la eŭropa komunumo en Bruselo, s-ro Jacques Delors, pri starigo de agadplano favore al la instruado de vivantaj lingvoj. La celo de tiu agadplano estas respekti la kulturan diversecon en Eŭropo kaj antaŭenigi la kvaliton kaj gradon de interkompreniĝo inter la civitanoj de la komunumo. S-ro Symoens emfazis, ke ILEI kaj UEA dividas tiujn celojn, kaj surbaze de tio faris specifan proponon pri starigo de lingva eksperimento en la dek du ŝtatoj de la EK. La letero, verkita kiel parto de kelknacia kampanjo de Esperantaj organizaĵoj, skizis la ĝisnunajn lernejajn eksperimentojn kaj citis la plejlastan rezolucion de Unesko. La agadplanon devas trakti la komisiono ĝis la fino de 1988.



LA DUA PEDAGOGIA-METODIKA KURSO

organizita de UEA-ILEI kun KCE
La Chaux-de-Fonds (Svislando), Julio 1989

Ĉi tiu dusemajna kurso okazos laŭ la instruprogramo de UEA-ILEI. La intensiva studo (6 horojn tage) finiĝos per praktikaj kaj teoriaj ekzamenoj (i.a. realigo de model-leciono) kaj per ricevo de atestilo de UEA-ILEI rajtiganta gvidi internaciajn Esperanto-kursojn. La kurson gvidos magistrino Irena Szanser el Varsovio. Ĉiu aliĝinto ricevos la 80-paĝan kurs-materialon anticipe. Aliĝoj kaj informoj de Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Leterkesto

Instrupolitiko de Eo: kiu respondecas?

(...)En la mondo, ni kredu, ke Eo-kursanoj ne mankas. Ni povas esperantigi, se ne la tutan mondon, almenaŭ grandan parton. Sed kiel, se mankus instruistoj? Ni ne tro fidu al la memlernantoj, kiuj estas kvante raraj. Se ni havus en ĉiuj lernejoj de ĉiuj nacioj minimume unu kapablan Eo-instruiston (veran pedagogon), kiu ricevis adekvatan formadon, ni povus garantii la aŭtomatan enkondukon de Eo en la lernejojn. Temas pri formado en ĉiu respektiva lando. La e-istoj havas la apartan avantaĝon surloke akiri scion tutmonde egalvaloran. E-istoj ja ne bezonas restadi en iu lando por majstri E-on.

Nia nuna komuna klopodo centriĝu al la formado de Eo-instruistoj, kio tamen ne forigas la privilegion de la asocioj organizi Eo-kursojn en la kluboj, grupoj por aĝaj personoj interesiĝantaj pri la lernado.(...)

En la nuna tempo, kiel por la unueca Eo-ekzameno, devas esti starigota komuna instrua politiko por ĉiuj landoj. La tasko kompreneble revenas al ILEI, kiu estas instrufaka Eo-organizaĵo por prilabori planon kaj konvenajn pedagogiajn materialojn.(...) En la kadro de la instrupolitiko estu aparte skizita la nomigo de oficiala konsulta komitato, la nura organo kompetenta por trakti kun priinstruaj instancoj temojn rilate Eo-instruadon. Al la instancoj estu oficiale anoncita la nomigo.

Eugéne Raveloson, Antananarivo, Madagaskaro

Kio mankas en IPR: la faktoj. Kie oni instruas Eon al infanoj kaj gejunuloj? Kiel oni instruas Eon al ili? (...) Estas tro da teoriaj artikoloj. Ni bezonas reton de landaj kaj regionaj informantoj. Mi proponas helpon por informi pri tio, kion mi konas en la regiono de Saint-Étienne pri la junulinstruada kampo en la elementa lernejo.(...)

M. J. Dany, La Ricamarie, Francio

(Fakte, la dua letero estis unu el la solaj du skribaj reagoj, kiuj atingis nin post nia opini-peto pri IPR... – La red.)

(En la artikolo "Infanlibroj en Esperanto", IPR 1988/1)...mi konstatis du ĝenajn preserarojn, ambaŭ p. 48, nome:

en HUNGARAJ FABELOJ la frazo "kompletigas tiujn higienaj konsiloj..." troviĝas en la recenzo de LA BLANKAJ GARDISTOJ, do estas forigenda de HUNGARAJ FABELOJ;

en DEK FABELOJ, ĉe la fino unu el miaj linioj elfalis, devus esti: kun ripetiĝaj frazoj aŭ vortoj kaj multe da dialogoj.

Jacqueline Gonin

Anoncoj:

PROJEKTO DE NOVA LERNOLIBRO PRI FIZIKO

Amplekso: ĉirkaŭ 11 ĉapitroj, 500-700 paĝoj.

Temoj: Mekaniko, Likvaĵoj kaj gasoj, Osciloj kaj ondoj, Varmo, Elektromagnetismo, Liberaj elektronoj, Optiko, Kvantuma teorio de la lumo, Radioaktiveco kaj atomoj, Partikloj, Relativeco; Konstantoj kaj mallongigoj, Registro. *Nivelo*: por studentoj de fiziko en la unua kaj dua universitata lernojaro. *Matematika nivelo*: abiturienta ekzameno.

Se vi estas fakulo kaj volas kunlabori, bonvolu skribi al:

Mag. Walter KLAG, Rudolfinergasse 8, A-1190 Wien, Aŭstrio.

ĈU SILENTO EN KLASĈAMBRO?

Mi sidas en klasĉambro fronte al ili. La kapon klinitan al la tablo, ĉiuj zorge skribas. Grava estos la kreita verko! De ĝi dependas ilia profesia estonteco, ĉar hodiaŭ ili trapasas la abiturientan ekzamenon!(...)Ĉiu seriozas, pensas, silentas. Bedaŭrinde ilian kvarhoran jam per si strečan laboron aĉe penigas najbara fifama bormašino, funkciigita de la najbara konstruejo. Foje senfine, seninterrompe, foje eĉ pli malice: skue ĝi singultas sian bruegon, kiel akcela motorciklo ronkronkojn elpafas.

Pacience la kandidatoj eltenas la bruon, eĉ šajnas ignori ĝin. Sed mi ne toleras: ĉu estas juste ilin taksi laŭ tiel perturbata laboro? Ĉu vere naŭza bruo helpas pripensi "naskiĝon de blokoj kaj malvarman militon" (1945-53)" kaj "agrikulturon kaj fiŝkaptadon en Japanio" aŭ la aliajn elekteblajn temojn?

Por ilin helpi, kion mi faris? (...)Homoj, jen mia demando: ĉu vi konas ilon mezurantan bruon, sufiĉe etan kaj malpezan por kunporti ĝin en via sako? Šajnas al mi, ke pro manko de taŭga mezurilo, malfacilas precize taksi malbonajn efikojn de bruo kaj serioze diskuti pedagogiajn problemojn ĉi-rilatajn per komparaj esploroj.(...)Mi šatus statistike interrilatigi gradon de bruo kun la aliaj instru-ĝenaj faktoroj; sed mankas ilo.

Ankaŭ mankas tempo: nun ili finis sian taskon, kaj ĉiujn taskopaperojn mi devas kolekti. Do, simple, se vi scias, de la ilo indiku al mi pezon, prezon kaj specon de vendejo. Afable dankos

Francisko DEGOUL, 54 CAILLOTS, F-93100 MONTREUIL

MONDKONGRESO DE MONDA ASOCIO PRI PSIKIATRIO DE INFANAĜO KAJ PRI KONCERNAJ SCIENCOJ

En la itallingva svisa urbo Lugano okazos, 20-24.09.1989, la kvara mondkongreso pri psikiatrio de la unua infanaĝo kaj pri koncernaj sciencoj. La mondkongreson organizas loka grupo de Monda Asocio pri Psikiatrio de la Unua Infanaĝo kaj pri Koncernaj Sciencoj. Tiu asocio fondiĝis en 1980. Ties nuna prezidanto estas la usonano Robert N. Emde, kaj ties honora prezidanto estas Erik Erikson. Apartenas al ties estraro Serge Lebovici (Francio), Bertrand Cramer (Svislando), kaj aliaj konataj specialistoj.

La Mondkongreso estos dediĉata al "Novaj Orientiĝoj pri la Unua Infanaĝo". Aparte, oni antaŭvidas jenajn temarojn: "Novaj orientiĝoj en psikobiologio", "Novaj orientiĝoj en kliniko", "Kulturaj variaĵoj kaj infana disvolviĝo", "Novaj orientiĝoj en prevento kaj en terapio", "Novaj orientiĝoj en la studo de netipaj evoluoj".

Estus interese, se partoprenus ankaŭ Eo-parolantaj kongresanoj, kiuj povus alporti la pruvon pri la ekzisto de "speciala" kaj rekta "interparola" tekniko (fakte, la oficialaj lingvoj estos la angla, la franca kaj la itala).

Se almenaŭ kelkaj Eo-parolantaj specialistoj partoprenos, eblos organizi ion specialan por ili, kio servu ankaŭ kiel ekzemplo de demokratia kaj efika interdisciplina scienca interšanĝo.

Interesatoj petu la informilon en angla-franca-itala de:

D-ro Tazio Carlevaro, Via A. Di Sacco 6, CH-6500 Bellinzona (Svislando).

Atingis nian redakcion la teksto de Literatura Manifesto '87 de la Iltisa Skolo kun la peto ĝin publikigi. Ĉar ĝia teksto jam aperis en pluraj revuoj kaj ĉar ĝia temo ne rekte koncernas nian revuon, ni bedaŭre malplenumas tiun peton, sed konsilas al interesiĝantoj turni sin al *Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601, Saarbrücken-Scheidt, FR Germanio.*

Samokaze ni gratulas la eldonejon Artur E. Iltis pro ĝia 20-jara ekzisto.

Eldoniĝis jam dua numero de la duonjara oficiala organo de Esperanto-Instituto de Dankook, "Mondo de Universitato". La lukse eldonita revuo enhavas en du lingvoj i.a. la konate elstaran artikolon de d-ro Helmar Frank: Propedeŭtika Valoro de la Internacia Lingvo, nepre legendan por pedagogoj. Abonebleco ne estas menciata, sed indas informiĝi ĉe *8 Hannam-dong, Seoul-140-714, Koreujo*. Gratulojn al eldonanto d-ro Chang Choong-sik kaj la kunlaborantoj pro la kreo de *universitata Esperanto-revuo* – ja tiaj periodaĵoj ne multas.

Aperis n-roj 1988/1-3 de OPUS NIGRUM, trimonata beletra-kultura periodaĵo de la Esperanto-fako en Universitato ELTE, Budapest. El la enhavo: FJODOROV: Survoje (kulturpolitika eseo); SIMON: La senkompata humanisto (eseo pri Sándor Szathmári); THOR: Budapešto (vojaĝaj notoj); noveloj originalaj de Georgo KAMAĈO kaj alia, tradukita, de Edward STACHURA; poemoj de Meva MARON, Cyprian NORWID kaj aliaj. Unu numero kostas tri internaciajn respondkuponojn, jarabono dek. La adreso de la redaktejo samas kun tiu de IPR.

Alvenis broŝuro pri la svedia urbo Falköping kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La modestaspekta, sed informoriĉa kajereto haveblas certe ĉe *Falköpings Esperantoklubb, Midgardsgatan 4, 521 44 Falköping, Svedio*.

POR SCII, KIE NI ESTAS...

Inter la ĉefaj taskoj de ILEI estas kreskigi la instruadon de Esperanto, kaj kvante kaj kvalite. Antaŭkondiĉo por tio estas la iom banala tasko scii kaj superrigardi la nunan staton de la instruado en niaj lernejoj.

Jam de pluraj jaroj s-ro G. Pirlot el Belgio arigas informojn pri la universitat-nivelaj kursoj kaj pri la leĝaj bazoj por instruado de Esperanto diversnivele. Tion li aperigis plurfoje en superrigardebla formo, laste en 1988. Sube vi trovos kompletigajn informojn por tiu eldonaĵo. Liaj klopodoj arigi similajn informojn pri lerneja instruado antaŭ la universitata nivelo renkontis malpli da reagoj, do ILEI nun klopodas iom pli rekte, nome per la apuda demandilo. Ĝi aperis jam en *Juna amiko* numero 88/3, kaj estas dissendita al ĉiuj landaj sekcioj de ILEI kaj elektitaj landaj asocioj de UEA.

Ni petas precipe niajn sekciestrojn zorgi, ke informoj pri ĉiuj lernejaj klasoj en la koncerna lando atingu nin senprokraste. Ni interesiĝas unuavice pri lernantoj inter la aĝoj de 5 kaj 18. Ni aperigos resumon de la informoj en 1989. Pliajn ekzemplerojn de la enketilo oni povas akiri de la donita adreso, alvokoj en asociaj bultenoj estas bonvenaj; ni povas liveri prespretan originalon se redaktoro pretas aperigi la enketilon mem (en formatoj A4 aŭ A5, t.e. la apuda.)

Helpu nin scii, ne nur *kie*, sed ankaŭ *kiaj* ni estas. Anticipan dankon pro via kunlaboro!

Stefan MacGill

ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ KAJ SUPERAJ INSTITUTOJ

Korektoj kaj aldonoj pri kursoj menciitaj en: G. PIRLOT: "Oficiala situacio de la E-instruado en la mondo", 7a eld. junio 1988.

Argentino (p. 20) — Rosario: la kurso ne plu okazas pro translokiĝo de la instruisto (laŭ la kursgvidinto, s-ro E. Kohei, let. 19.08.1988).

Hungario (p. 14.) — Kecskemét: Porinstruista Altlernejo, la kursgvidanto NE estas s-ro S. Gyenes, sed s-ro László Vörös (Pákozdi csata u. 9 I/1, H-6000 Kecskemét) (laŭ s-ro L. Vörös, let. 25.07.1988).

Jugoslavio (Serbio) — Beograd: a, Ŝtata Pedagogia Instituto; b, d-ro Pribislav Marinkovlĉ kaj s-ro Monĉilo Ocokoljlĉ (Lenjinov bul. 97/18, YU-11070 Novi Beograd); c, ekde marto 1987 ĝis majo 1988: tri trimonataj seminarioj, kursoj por instruistoj el bazaj kaj mezgradaj lernejoj; kun diplomo, kiu rajtigas instrui Eon kadre de liberaj aktivaĵoj. La 3an de oktobro 1988 komenciĝis nova serio de seminarioj. (laŭ la kursgvidanto, s-ro M. Ocokoljlĉ, let. 25.06.1988).

Pollando (p. 16.) — Bydgoszcz: a, Supera Pedagogia Lernejo, kadre de la studo de fremdlingvoj kaj de la didaktika katedro: c, en la lerneja jaro 1988/89, dum 4 semestroj, estos tri grupoj da komencantoj (2 h/sem) kaj 56-persona grupo de progresantoj (2 h/sem + metodiko kun ekzameno, 2 h/sem). (laŭ la kursgvidantino, d-rino I. Strachanowska, let. 11.06.1988). — Bydgoszcz: a, Agrikultura Inĝeniera Akademio: b, ?; c, ekde? Libervola, nedeviga lektorato; sen ekzameno nek atestilo. (laŭ d-rino I. Strachanowska, let. 11.06. 1988).

Usono (p. 23) — Los Angeles (California): la kurso ne plu funkcias de tri jaroj (laŭ la kursgvidinto, s-ro E. Reed, let. 15.08.1988). — Potsdam (New York): la kurso ne plu estas organizata (laŭ la kursgvidinto, Prof. d-ro H. Tonkin, let. 22.06.1988).

Ĉinio — Qingdao (Shandong): a, Qingdao-a Universitato / Qingdao Daxue, Qingdao, Shandong; b, vicprof. Li Weilun; c, ekde okt. 1988. Speciala E-kurso, deviga; 1 jaro, 10 h/sem (s. 350 h); kun ekzameno kaj diplomo. (laŭ la kursgvidanto, vicprof. Li Weilun, let. 12.09.1988).

INTERNACIA LIGO de ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ ILEI

Enketilo pri instruado de Esperanto 1988/1989

Bonvolu resendi ĉi tiun demandilon al Juna amiko, *Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario, ĝis la 31a de decembro 1988.*

Bonvolu respondi aparte por ĉiu klaso. Kompletigu respondojn dorse, se necese. Aldona pli detala raporto estas ankaŭ bonvena.

Nomo de lernejo:

Urbo: Lando:

Poŝta adreso de la lernejo aŭ instruisto:

Nomo de la instruisto:

Ĉu profesia instruisto? JES/NE Dungito de la lernejo? JES/NE

Kiom da lernantoj en la kurso: Kiomaĝaj:

Kiom oficiala estas la kurso: (hobia, oficiala, deviga, nedeviga ks.)

Komenco de la kurso: Atendata daŭro:

Kiom da studhoroj entute apartenas al la kurso:
Kiom da studhoiroj okazas ĉiusemajne:

Kiun lernolibron aŭ materialon vi uzas:

Ĉu fine de la kurso okazos ekzameno? Se jes, ĉu oficiala?

Ĉu dum la kurso vi komencos uzi Esperanton praktike? Kiel?

LINGVOINSTRUADO PER BILDOJ

La artikolo de Johann Hammond Rosbach en IPR 1988/1 instigis min informi la Eo-instruistojn pri la ekzisto de bildaro specife kreita de Unuiĝo Franca por Esperanto por Eo-instruado per bildoj. Ne temas pri programita kurso, sed pri materialo por paroligi gelernantojn, kiuj lernis perkoresponde aŭ aŭtodidakte, aŭ kiuj ankoraŭ ne sufiĉe flue parolas la lingvon. La celo estas aŭtomatigo de strukturoj. Ĝi estas uzebla dum vesperaj kursoj aŭ dum semajnfinaj aŭ semajnaj staĝoj. Speciala atento estas dediĉita al la senvortaj bildrakontoj, kiuj ilustras scenojn el la vivo, alparolantajn la lernantaron kaj ebligantajn viglajn diskutojn. Ankaŭ temoj por skribaj hejmaj taskoj enas. La broŝuro entenas pedagogian gvidfoliaron por la instruistoj.

EDMOND LUDWIG

METODO 15 – La aventuroj de sinjoro MIMEM

Union Francaise pour l'Espéranto 4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 – Paris

(La kajero enhavas eĉ du kantojn tradukitajn el la franca. La "Listo de la plej necesaj strukturoj" komenciĝas per la frazo "Li trinkas ruĝan vinon" – La red.)

Model-lecionoj per aŭdvida kasedo

La hungara sekcio de ILEI registris ok model-lecionojn sur aŭdvidan bendon (videokasedon). La celo estas disponigi analizeblan materialon por lingvo-instruistoj kaj por uzo en metodikaj kursoj kaj seminarioj. La lecionoj ne estis postredakte "beligitaj", ili donas do realisman bildon pri la disvolviĝo de la leciono kaj la reagoj de la lernantoj. Eĉ spertaj kursgvidantoj trovos novajn ideojn kaj teknikojn ĉi tie.

La ok lecionoj estas preparitaj por diversaj aĝ-grupoj kaj niveloj. Por komencantaj infanoj gvidas *H. Behrmann* (FR Germanio), por komencantaj junuloj *Pranjiĉ* (Jugoslavio) kaj por komencantaj plen-kreskuloj *E. Farkas-Tatár* (Hungario). Gvidas progresintajn infanojn-junulojn *Lowinska-Varró* (Pollando/Hungario), *I. Szanser* (Pollando) kaj *Janeva* (Bulgario). Rol-ludon kun progresintaj studentoj gvidas *S. MacGill* (Nov-Zelando/Hungario) kaj lecionon pri heraldiko kun plenkreskuloj gvidas *Dr. T. Dahlenburg* (Germana DR).

La kasedon akompanas samtitola kajereto kiu klarigas la celon de la projekto kaj donas koncizan resumon de la enhavo de ĉiu leciono. La kasedo estas kolora, 180 minuta, per VHS, por PAL kaj SECAM. La kasedo kaj libreto "**Instruado en la praktiko**" kostas 50 ned. gld. aŭ egalvaloron; en Hungario 1200 forintojn. Mendu ĉe la Hungara sekcio de ILEI/ Pedagogia komisiono de HEA, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens
Putsesteenweg 131/A
B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66

Vicprezidanto : Stefan MacGill
Zsókovar ut. 46 IX 36
H-1157 Budapest; tel. (1)564-093 aŭ 563-659

Ĝenerala Sekretario : Audrey Childs-Mee
Postbus 25041
NL-3001 HA Rotterdam; tel. (010)425.4625

Kasisto : Bertil Andreasson
Södra Rörum pl. 455
S-24200 Hörby; tel. (0415)-501 52

Vicsekretario : Malcolm Jones
41 Causeway
GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041

Membroj : Till Dahlenburg
Str. der DSF 13
DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528
Zang Danchen
Gong Wai Xi, Shifan Daxue
Wuhan, Huazhong, Ĉinio

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (S, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)
Sonnabend Helmut (D, 1987) – Dazzini Catina (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinujo : Zhang Danchen, Huazhong Normal University, Wuhan PR China
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Lilienthalstr. 3, D-6900 Augsburg
Hispanujo : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : David Mager, P.K. 4246, IL-84142 Beer-Ŝeva
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa

Japanujo : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegujo : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Lódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Rûzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sovet-Unio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Sud-Afriko : Jape Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende

Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)